

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Grandioza semajno en

Vilno: TEĴA refunkcias

Parlamenta rezolucio

Trajno "Zamenhof"

Jubilea fervojista
kongreso

Tonkin komentas pri
jubileoj kaj jubiloj

Irlando diris "Ne!"

Brazilo protestas

Moskvo aŭ Londono?

"Rusa Antologio":

Vasilij Ĵukovskij

Novelo de Borges

Andreas Künzli pri nia

Enciklopedio



Julio
2008

№7

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №7 (165)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №7 (165).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 23 июня 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Iam Nietzsche nomis la enviemon (motoro del socialisma moraleco. Tiu bravura hipotezo ŝajnas iĝi aksiomo sur la postsovetia spaco. Responde al strata uson-televida enketisto sondanta kiel la ruslandanoj rilatas al miliarduloj unu mia samlandano rimarkis en plena konvinko:

“Mi ŝatas la miliardulojn. Ju pli da miliarduloj, des pli da bono al mi kaj mia patrujo”.

Restis malklare ĉu la respondanto revis pri la lando kun cent milionoj da miliarduloj, ĉu lia fantazio haltis ĉe cent aŭ mil. Klare ke li uzis la tipan kliŝon pri riĉaj homoj. Miliardulo kiel ekstrema enkarniĝo de riĉulo estas fenomeno eksterranga kun speciala pezo: miliono da miliarduloj sur-Ruslande sufiĉus por renversi la planedon.

Mi ne sukcesis ĝui la komikan efekton de la repliko: konfuza estis tute serioza tono de la estimata ĵurnalo, kiu aprobe reproduktis la respondanton. Des pli mi ne sentas komika la fenomenon en si mem. La miliardoj superkoncentritaj *emas renversi*. Ili renversas nian platon del ekzisto — niajn kutimojn, morojn, normojn, nian konsiencon, moralecon kaj memrespekton, — ni ruliĝas do misekvilibre kaj retrovas nin iom post iom ĉiam pli funde-profunde...

Malforta estas la homo. Post la diagnozoj kiujn mi sonigis ĉi-rubrike pri la profesia sporto mi ne devus rigardi tiun “Euro-2008”. Peke kaj repeke mi rigardis. Tamen estis la futbalo. Ĉiam pli funde-profunde: jam oni dronas en reklamo. Ĉirkaŭ la luda tereno kaj ĉirkaŭ la luda tempo. Jam ne ekzistas la ludado mem, al mi ĝin prezentas paro de *miliarduloj*. Jam ne restas tempo por intervjuoj kaj postkomentoj — trioble ripetataj tri reklamaj blokoj pri vira seksopotenco nin amuzas anstataŭe.

“Vi volas la reludon post egala partio?” — ironias, kvazaŭ ĉirkaŭ mi, juna komentisto en la etero. — “Kia malnovmoda ideo! Tiu del epoko de la 1960-aj”.

“Kial ili ne prezentu la ludojn? Ja ili estas *la sponsoroj*”, — eksplikas al mi mia juna konatino.

La nova juna generacio ŝajnas pragmata. En la vero ĝi estas — tute nevideble al si — malaltigita laŭ la skalo de vivovaloraj pretendoj. Ekzistas ja certaj kriterioj, per kiuj oni ordigas la tutan entreprenon, — tiu juna komentisto, tiu juna konatino ne troviĝas en la horizonto del konsidero. Ankaŭ mi kaj vi. Sed ni almenaŭ kapablas tion senti.

McDonald's, *Coca-Cola* kaj aliaj povas esti bonaj kompanioj, egale malbonaj ili povas esti. Ili rajtas esti-malesti sponsoroj. La nuro kiun ili ne rajtas kuŝas sur tiu komuna kampo, kie interplektiĝas en senĉesa ludo kaj kreas labilan ekvilibron certa kompleto de agantoj. Se tiu kampo estas sufiĉe vasta kaj satigita de diversaj vektoroj, la ekvilibro sur ĝi kreita povas nomiĝi demokratio. Evidente, en tiu konkreta futbala afero nomata “Euro-2008” — kaŭze de du, tri, dek kompaktaj eŭroportaj vektoroj — mi kaj vi kaj centmilionoj da eŭropanoj iĝis “en la situo eksterluda”.

La sola momento konsola sin prezentas inter tiuj reklamaj Sciloj kaj Ĥaribdoj. Ĝi estas la futbalo mem. Malgraŭ ĉio — la bildo valoras spektan.

Alen Kris

Sur la kovrilfoto estas la protagonistoj de la Esperanto-evento de 1^a monato. La 1an de junio la paro Zamenhof trairis Pollandon en la unua vojaĝo de la ĵus lanĉita trajno *Zamenhof*. Se vi loĝas en Pollando, aŭ vizitas ĝin, uzu la okazon vojaĝi per la unika surrela ZEO. (*Fotis Mateusz Holownia*)



Grandioza semajno en Vilno

Se eblas paroli pri unika, interesa kaj grava evento de la ĉi-jara Esperantomovado, tiukaze necesas menci la 1an Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, kiu okazis 26–30 maj en Vilno, la ĉefurbo de Litovio. Unika oni povas nomi ĝin nelaste pro tio, ke al ĝia sukcesplena efektiviĝo kontribuis diversaj kunlaborantaj organizoj, kiuj kapablis allogi al Vilno multajn el la plej elstaraj aŭ originalaj reprezentantoj de la Esperanto-movado, kiuj formis la riĉan kaj interesan programon. Ĉi tiuj du faktoroj faris el la kongreso sendube gravan momenton en la historio de la nuntempa Esperanto-movado, kiu povas fieri, ke ĝi posedas la subtenon, ne nur moralan, sed ankaŭ finanĉan, de la litovia ŝtato, kiu disponigis al la kongreso la Malnovan Urbodomon kaj la Konstitucian Salomon de la Sejma Palaco (parlamento), ambaŭ tre taŭgaj konferencejoj. La kuliso do estis ege digna, kaj la esperantistoj sentis sin ree sincere akceptitaj de lando kaj ŝtato, kie antaŭ tri jaroj (do en 2005) okazis la 90a Universala Kongreso de Esperanto kaj la Kvara Nitobe-Simpozio, kiuj evidente restis en bona memoro de Litovio.

Mini-UK

Ĉar laŭmodele ĉi tiu ĵurnalista kongreso estis kopio de UK, tial iuj nomis ĝin “mini-UK”. Tiuaspekte Povilas Jegorovas, prezidanto de LKK, efike lernis de UK-sperto. Al la kutimaj akcesoraĵoj apartenas oficialaj akceptoj, aŭspicioj, kongresa temo, vasta prelega programo, kongresa libro, kongresa kuriero, kongresa siglo (kun butono), kongresa dokumentaro, libroservo, tuttaga ekskurso, k.a. El ĉi tiuj akcesoraĵoj la organizantoj utiligis resurse la maksimumon eblan. Oni aŭdis la opinion, ke la kongreslibro aspektas eĉ pli bele ol averaĝa UK-kongreslibro, ke la prelegoj estis pli altnivelaj ol dum UK, ke pro la riĉeco de la kulinaro la aŭtoritatulaj akceptoj ĉe urbestro, ĉefministro kaj parlamentestro daŭris pli longe ol dum UK, kvankam en Vilno la alparoladoj de iuj oficialuloj eble estis rekorde mallongaj.

Laŭ aliĝoj troveblaj en la kongreslibro devis alveni 183 personoj el 37 landoj. Reale troviĝis kelkaj personoj kaj landoj malpli. Kvankam la plimulto de la ĉeestantoj havis nur marĝenan aŭ amatoran ligan al ĵurnalismo, ja troviĝis inter ili ankaŭ redaktoroj de pluraj Esperanto-revuoj de diversaj tendencoj. Pro

tio iuj prelegoj kaj diskutoj dekomence ne povis esti tro faknivelaj, sed por tiu ĉi kongreso, kiu ne estis scienca konferenco, tio ŝajne ne tiom gravis.

De turisma programo al seriozaj fakprelegoj

La kongreso komenciĝis lunde per tuttaga ekskurso tra la malnova urbo de Vilno, kiu fariĝas ĉiujare pli bela, kaj al Trakai, kie leviĝas la kastelo de la litova grandduko Gediminas (13-14 jc) kaj kie loĝas minoritataj komunumoj de karaimoj kaj tataroj.

La faka programo mem estis enkondukita marde en la Malnova Urbodomo per prelego de prof. Humphrey Tonkin (Usono), konsiderata kiel unu el la plej eminentaj nuntempaj esperantistoj, pri la kongresa ĉeftemo *Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto*. Pro manko de tempo kaj pro la ŝarĝiteco de la mult-tema kongresa programo la kongrestemo evidente iom perdis la atenton, kiun ĝi meritis. Pri ĝi tamen eblas legi en la kongreslibro, en la unua numero de la kongreskuriero *La Fera Lupo*, kiu estis redaktata de Choe Taesok, kaj en la fina dokumento.



Samtage diversaj prelegantoj prezentis siajn temojn: ekzemple Audrys Antanaitis (Litovio) pri amaskomunikado en Litovio, Aleksander Korĵenkov (Ruslando) pri Zamenhof kaj la gazetararo. De la sama aŭtoro troviĝas en la kongreslibro cetere tre leginda studo pri la historio de la Esperanto-gazetararo. Plue Stano Marček (Slovakio) donis superrigardon pri la redaktoroj de la revuo *Esperanto* (UEA) dum la pasintaj cent jaroj. Petras Čeliauskas (Litovio) rakontis pri la bizaraj imagoj kaj kliŝoj de iuj eksterlandanoj pri Litovio kaj omaĝis la revuon *Litova Stelo*, kiun li redaktis dum deko da jaroj. Tomasz Chmielik

(Pollando) prezentis la meritojn de Edmond Privat kiel ĵurnalisto, kaj Detlev Blanke (Germanio) prelegis pri la rolo de lingvistiko en la informado pri Esperanto. Ĉi tiu preleganto admonis, ke ignori aŭ timi lingvistojn estus sen-senca sinteno, ĉar ĝuste lingvistoj ofte troviĝas en decidoporta pozicio kaj do povus esti utilaj al ni.

La anticipa intereso por prelege kontribui dum la kongreso estis tiom granda, ke la kompilantoj de la programo, ĉefe estraranoj de TEĴA, devis rifuzi multajn kontribuproponojn, kiuj unuavide ŝajnis ne esencaj, kaj faris pli severan elekton, kiu prezentiĝas en la kongreslibro. Ankaŭ tio estas unika, despli ke en la Esperanto-movado ofte estas malfacile entute trovi taŭgajn prelegantojn. La granda kvanto de prelegoj devis en la dua tago esti disdividita en tri sekcioj, en kiuj elpaŝis inter alie Andreas Künzli (Svislando), Jiří Caletka kaj Petro Chrdle (Ĉeĥio), Dimitrije Janičić kaj Zlatoje Martinov (Serbio), Josip Pleadin kaj Vladimir Jurković (Kroatio), Ahmad Reza Mamduhi (Irano), Giorgio Silfer kaj Dieter Rooke (Esperanta Civito), Stefan MacGill (Hungario), Jevgenij Gaus (Litovio) kaj Peter Baláĉ (Slovakio), Frimpong Ampomah Badu (Aŭstralio), Ljubomir Trifonĉovski (Bulgario), Abdurahman Junusov (Ruslando/Dagestano), Jianhua Li (Ĉinio) kaj Yves Nevelsteen (Belgio).

De la Urbodomo al la Parlamento

Ĵaŭde la programo estis daŭrigata en la Konstitucia Salono de la Litova Parlamento per prelegoj de Jukka Pietiläinen (Finnlando), István Ertl (Luksemburgio) kaj Kalle Kniivilä (Svedio) pri defioj de la nuntempa (Esperanto-) ĵurnalismo.

Ĉi tiujn modernismajn postulojn draste kontrastis la prezentado de flaviĝinta filmo pri Bona Espero en Brazilo produktita antaŭ 25 jaroj fare de Roman Dobrzyński (Pollando). Koncepte modernigenda tutcerte estas ankaŭ la radioprogramo de Pola Radio, pri kiu parolis Barbara Pietrzak. Ŝi nuntempe oficas kiel ĝenerala sekretario de UEA, kiu aŭspiciis la kongreson.

Kiel en Esperanto-rondoj, kies laboro ofte estas karakterizata de amatoreca nivelo, eblas apliki allogan, profesinivelan grafikan koncepton ĉe Esperantomagazino, imprese montris Claude Nourmont (Luksemburgio) pere de la

revuo *Le monde de l'espéranto*, gazeto de Unuiĝo Franca por Esperanto. La responsuloj, kiuj evidente sukcesis rompi kun la pasinteco de l'diletanteco, simple aĉetis ĉe ekstera profesiulo la grafikan ŝablonon por adapti ĝin al la propraj bezonoj. Enhave la revuo eble ankoraŭ estas iom banala, sed evidente sufiĉa kiel "armilo" por trafi la prioritatan celpublikon. Finfine oni volas altigi la membronombron de la landa asocio kaj gajni novajn klientojn.

Kvazaŭ la inverso de la franca modelo estas la nova socikultura revuo *Spegulo*, kiun Kazimierz Leja (Pollando) prezentis: grafike modeste, sed aspekte tamen agrable aranĝita ĝi alportas enhavon sur alta intelekta nivelo, kiu facile povas konkurenci ekzemple kun *Literatura Foiro*. La naskiĝo de *Spegulo* fakte estas la rezulto de interna konflikto en la pola Esperanto-movado; pro manko de interkonsento inter la nova estraro de PEA kaj la eldonejo *Hejme*, kiu redaktis kaj produktis la revuon *Pola Esperantisto* dum kvin jaroj, la kunlaboro ne estis daŭrigita.

Samtipe produktitan revuon kiel la francoj faras, povis prezenti Perla Martinelli (Svislando), ĉefredaktorino de *Femina*.

Krome, pri siaj originalaj sciencaj esploroj prelegis Aleksandro Melnikov (Ruslando), kiu montriĝis ankaŭ lerta distranto de la publiko, aplikante humurajn didaktikajn elementojn. La pura retorika kontraŭo de Melnikov estis la prelego de Árpád Máthé (Hungario), kies prononca monotoneco estis tiom evidenta, tiel ke mi subite endormiĝis — okazaĵo tamen malofta ĉe mi.

Harmonio sen polemiko

Per tio ĉi ni alvenas ĉe la lasta tago, kiu finiĝis per kelkaj restantaj elpaŝoj, inter alie de Seán Ó Riain, irlandia diplomato kaj prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, pri la propedeŭtika efiko de Esperanto en kondiĉoj de plurlingveco. La italoj Ranieri Clerici kaj Gian Carlo Fighiera filozofiumis pri lingvaj homrajtoj respektive traktis la deficitajn ĉe la ekstera informado dum Esperanto-kongresoj pere de ĵurnalismaj medioj. Alfred Schubert, redaktoro de *Esperanto aktuell*, rakontis pri la germana sperto en Esperanto-ĵurnalismo kaj Vilhelmo Lutermano klarigis la projekton *Le monde diplomatique* en Esperanto.

La plej juna prelegantino, Aneto

Muhlemann el romanda Svislando, prezentita kiel nova redaktorino de *Heroldo de Esperanto*, esprimis la deziron, ke la Esperanto-ĵurnalismo konduku ne al kvereloj, sed trans la ideologioj al paco kaj kunlaboro. Efektive oni devas diri, ke la etoso dum tiuj tagoj estis tre paca kaj harmonia kiel decas por internacia konferenco esperantista. Eĉ la ĉeesto de kompakto grupo de la Esperanta Civito, kiu rande de la kongreso kunvokis siajn proprajn kunsidojn, ne povis maltrankviligi la ceteran kongresanaron, kiu verŝajne restas daŭre lojala al UEA. La esperantistoj lernis, ke polemiko en publikaj kunvenoj estas danĝera afero, ĉar ĝi povas facile ofendi aliajn en kazo de kritiko, kaj pro tio oni kutime evitas ĝin. Tamen iom pli da siaspeca spico ne estus damaĝinta al la diskutoj por igi ilin pli viglaj kaj pli interesaj.

Revigliĝo de TEĴA

Nu oni ne forgesu, ke grava problemo estis solvita dum la kongreso: la restarigo de TEĴA — Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, kiu estis fondita en 1946 kaj kiu poste spertis plurajn revigliĝojn kaj refondojn. La nova estraro sub prezidanto Audrys Antanaitis prezentis sin dinamika kaj optimisma kaj promesis multe labori, kompreneble honorofice. Trideko da membroj povis esti spontane rikoltata. TEĴA dume ne postulas kotizon, dependante de mondonacoj. La kongreson ĉeestis ankaŭ la prezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio, Dainius Radzevičius. Fakte en septembro 2007 en Vilno jam okazis fonda kunveno de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio (LEĴA). Por ke tiuj societoj estu daŭre vivipovaj, necesas aktivuloj, membraro, agadoj kaj mono.

Iom da prikomentado

Ĝenerale dirite, se mi devus disdoni pritaksojn pri la prelegoj laŭ tri aspektoj (enhavo/substanco, retoriko/oratoriko, metodiko/didaktiko) nur malmultaj ricevus bonan poentaron. Tio montras, ke ni ankoraŭ devos multe plibonigi nian arton prelegi kaj publike nin prezenti en Esperanto. Mi estas konvinkita, ke ankaŭ per ioma mem-trejnado ni sukcesos forigi ĝenajn fonetikajn prononcinterferojn, enhavan balaston kaj metodojn retorike-metodike malkonvenajn. Tiusence la 30-minuta prelegeblo estis por ni ĉiuj bona ekzercokazo.

Se ĉio dum la kongreso laŭ mia opinio estis tute pozitiva, bona kaj brila (eĉ la vetero), mi tamen ne volus preterlasi du principajn kritikajn rimarkojn pure subjektivajn.

Unue, mi bedaŭras, ke krom nur du litovaj prelegantoj ne povis esti engaĝitaj pli da ĵurnalistoj el tiu lando por interesa kontribuo, despli ke laŭ la adresaro aliĝis 62 personoj el Litovio. Ankaŭ vizitoj al lokaj redakcioj povintus esti tute interesaj, tiom pli ke en Vilno ekzistas amaskomunikiloj en diversaj lingvoj (ĉefe litova, pola, rusa, angla).

Due, min iom ĝenis la troa fokusado al priesperantaj aŭ esperantistaj temoj. Ja konsciante, ke temis unuavice pri aranĝo, en kiu la partoprenantoj, t.e. la esperantistoj, volas trakti kaj eble solvi prioritatajn proprajn problemojn, mi tamen bedaŭras, ke oni ne estis pli malferma al neesperantaj temoj traktindaj *per* Esperanto. La prezentita programo koncepto eble enhavis la riskon, ke estis ripetataj kaj gurdataj multaj konataj argumentoj, opinioj, komentoj kaj rekomendoj, kiuj estas ĝenerale konataj al sperta movadano. Do mia sugesto al la organizantoj de estonta analogo kongreso koncernus ĝuste la deziron emancipiĝi de pura esperantista etoso, por sukcese eliri la verdan getton. Kiam ni malfermiĝos al la ekstera publiko, eble nur tiam la Esperanto-movado vidos verajn novajn progresojn antaŭen.

Grandanima gastamo litova

La eksterlandaj gastoj loĝis en la mezklasa turisma hotelo *Ecotel*. La organizantoj de la kongreso malavare transprenis la kostojn por loĝado kaj manĝado kaj eventuale repagis ies vojaĝkostojn.

Restas al mi esprimi sinceran gratulon kaj grandan dankon al la kongresaj organizantoj, antaŭ ĉio al Povilas Jegorovas, kiu estas samtempe prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, ĉefdelegito de UEA por Litovio kaj ĝenerale la ŝlosila esperantisto kun multaj meritoj en tiu lando. La nomoj de liaj sindonaj kunlaborantoj estas legeblaj sur paĝo 13 de la kongreslibro. Ĉi tiuj fervoraj samidean(in)oj ebligis la efektivigon de tiu ĉi modele organizita kaj plene sukcesinta kongresa semajno, kiu, kiel post legado de tiu ĉi raporto oni povas kun certeco konstati, estis vere unika, interesa kaj grava, unuvorte grandioza.

Observante la amaseton da fotist(in)oj, kiuj kiel formikoj senĉese cirkuladis dum la kunsidoj por kapti ĉion kaj ĉiun, ĉu kun aŭ sen ĉapelo, oni devas konstati evidentan dokumentindon de la evento, kiu sendube havis ankaŭ propagandan valoron, kaj por Esperanto kaj por Litovio.

Andreas Künzli

Legu pli pri TEĴA
<http://www.tejha.org/>

Pollanda parlamento pri Esperanto Trajno Zamenhof

12 jun la pollanda Sejmo (parlamento) per 397 voĉoj “por” kaj neniu “kontraŭ” akceptis rezolucion okaze de la 100-jariĝo de UEA (*vd. la tekston sube*).

Per tio la pollandaj parlamentanoj rekonis la meritojn de UEA kiel daŭriganto de d-ro Ludoviko Zamenhof, kaj subtenis la internaciajn klopodojn, kiuj celas, ke UEA estu honorita per la Nobel-premio pri paco.

Laŭ Barbara Pietrzak, ĝenerala sekretario de UEA, la rezolucio estis akceptita laŭ la propono de la parlamenta komisiono pri kulturo kaj amaskomunikiloj. La projekton prezentis grupo de 21 deputitoj.

Reta televido pri Esperanto

13 jun 2008 ĉe www.itvc.pl aperis la kvara programo de *TV Esperanto*. La projekto konsistas el serio de programoj, kiuj promocias Esperanton kaj la naskiĝurbon de Ludoviko Zamenhof. Ni esperas, ke ĝi iĝos ankaŭ diskut-forumo por esperantistoj el la tuta mondo. Bonvolu sendi viajn komentariojn kaj opiniojn rete: esperanto@itvc.pl.

Robert Kamiński

La unuan de junio, frumatene, en la stacidomo de Bjalistoko, la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof, la bjalistoka urbestro Tadeusz Truskolaski salutis ĉiujn alvenintajn gastojn kaj solene ŝanĝis tabuleton de la trajno “Bjalistoko — Bielsko-Biała”, kiu tiel renomiĝis de *Narew* al *Zamenhof*.

Je 6h05 la urbestro blovis la fervojan fajfilon, kaj la malnovmode vestitaj Ludoviko (Andrzej) kaj Klara (Nina) Zamenhof forveturis. En la stacidomoj de Varsovio (8h30), Piotrków Trybunalski (10h30) kaj Sosnowiec (12h50) la trajnon *Zamenhof* renkontis esperantistoj, kiuj salutis, kantis kaj recitis poemojn, prezentis donacojn kaj fotiĝis kun la paro Zamenhof.

Je 14h40 en la finstacio Bielsko-Biała la trajno, esceptokaze, haltis ĉe la ĉefkajo, por ke la honoraj gastoj rekte venu al la renkontantoj, kun muziko de loka montara muzikgrupo. La programo en Bielsko-Biała enhavis, interalie, viziton de baza lernejo, kie Ludoviko Zamenhof instigis lerni sian Lingvon Internacian.

Andrzej Remza
Přemo Wierzbowski

Rezolucio de la Sejmo de Pola Respubliko

la 12an de junio 2008

pri la omaĝo de la 100a datreveno de la kreiĝo de Universala Esperanto Asocio

La Sejmo de Pola Respubliko en la 100a datreveno de la kreiĝo de Universala Esperanto Asocio esprimas la rekonvortojn al la daŭrigantoj de la [verko] de d-ro Ludoviko Zamenhof, kiu kreante la lingvon Esperanto deziris certigi al ĉiuj homoj la eblon de reciproka kompreno kaj interkompreniĝado sendepende de la nacieco, raso, religio aŭ mondkoncepto.

Esperanto ligas homojn en riĉa kaj varia kulturo, kies fundamenta mesaĝo estas internacia amikeco kaj universala paco.

La Sejmo de Pola Respubliko dezirante omaĝi la kontribuon de d-ro Ludoviko Zamenhof al la monda civilizacia heredaĵo, subtenas la klopodojn de internaciaj medioj honori Universalan Esperanto-Asocion per la Paca Nobel-Premio.

Sejmmarŝalo
Bronisław Komorowski

Uchwała Sejmu Rzeczypospolitej Polskiej

z dnia 12 czerwca 2008 r.

w sprawie uczczenia 100. rocznicy powstania światowego Związku Esperantystów

Sejm Rzeczypospolitej Polskiej w 100. rocznicę powstania światowego Związku Esperantystów składa wyrazy uznania kontynuatorom dzieła dr. Ludwika Zamenhofa, który tworząc język esperanto, pragnął zapewnić wszystkim ludziom możliwość wzajemnego zrozumienia i porozumiewania się niezależnie od narodowości, rasy, religii czy wyznawanych poglądów.

Esperanto łączy ludzi w bogatej i zróżnicowanej kulturze, której podstawowym przesłaniem jest międzynarodowa przyjaźń oraz powszechny pokój.

Sejm Rzeczypospolitej Polskiej, chcąc uhonorować wkład dr. Ludwika Zamenhofa w światowe dziedzictwo cywilizacyjne, popiera starania środowisk międzynarodowych o uhonorowanie światowego Związku Esperantystów Pokojową Nagrodą Nobla.

Marszałek Sejmu
Bronisław Komorowski

“Esperanto estas morta lingvo”

Ĉeĥio estas unu el la ok landoj de la Eŭropa Unio, kiuj ĝis nun ne ratifis la Lisbonan traktaton. 16 jun dum la vizito de la prezidento de Francio en Prago, disvastiĝis informoj pri kritika eldiraĵo de la prezidento de Ĉeĥio, Václav Klaus, kontraŭ la plano por plia Eŭropa integriĝo.



«Ni devus lasi la homojn loĝantajn en la eŭropa kontinento plu vivi kiel ĉeĥoj, poloj, italoj kaj danoj. Ni ne transformu ilin en “eŭropanojn”. Tio ĉi estas misa projekto. La diferenco inter ĉeĥo, polo, italo, dano kaj eŭropano estas la sama kiel inter la ĉeĥa, pola, itala kaj dana lingvoj kaj Esperanto. Eŭropismo egalas al Esperanto — artefarita, morta lingvo», — Václav Klaus diris en intervjuo de la gazeto *Lidové noviny*.

Václav Klaus estas saniĝanta post operacio, kaj mem ne renkontas la vizitantan prezidenton de Francio. Anstataŭe Nicolas Sarkozy renkontiĝas kun la ĉefministro de Ĉeĥio, Mirek Topolánek.

La eldiraĵo de Václav Klaus memorigas pri la diraĵo de la tiama kanceliero de Germanio, Helmut Kohl, farita dum oficiala vizito en Nederlando en 1995. Tiam li argumentis kontraŭ timoj, ke pli malgrandaj landoj de Eŭropo, kiel Nederlando, povus perdi sian propran identecon pro la eŭropa integriĝo. Tian perdon de identeco li komparis kun Esperanto:

“Ni ne volas Esperanto-Eŭropon, sed Eŭropon, en kiu ĉiuj plu havas sian identecon”, — li tiam diris.

En 1992 Peter Gauweiler, la tiama konservativa ministro pri la medio en Bavario, nomis la proceson de Maastricht “totalisma revo”, kaj ridindigis unu el ties centraj partoj, la komunan valuton, kies enkonduko tiam ankoraŭ estis nur planata, nomante la eŭron “Esperanto-mono”.

Tute lastatempe la germana eksministro pri eksterlandaj aferoj, Joschka Fischer, en artikolo en la gazeto *Die Zeit*, menciis la iaman eldiraĵon de Peter Gauweiler pri “Esperanto-mono”, konstatante, ke la “Esperanto-mono” tute ne iĝis tia teruraĵo, kiel antaŭvidis la kritikantoj, sed male tre utilas en la nuna malstabila ekonomia situacio.

Laŭ *Libera Folio*

Jubilea fervojista kongreso

La jubilea 60a Internacia Fervojista Kongreso okazis 17–24 maj en Poznano (Pollando) kun 169 partoprenantoj el 20 landoj de Eŭropo kaj Azio.

Krom faka programo, dum la kongreso estis multaj ekskursoj kaj kultura programo de la societo *E-senco*, kiu ĉiujare pretigas ARTajn KONfrontojn en ESperanto. La kongreso ricevis helpon de la Societo pri Apogo de Sporto, Turismo kaj Kulturo *Kolejarz*, pollanda reprezentanto de FISAIC, kiu agas en diversaj flankoj de fervojista internacia kulturo.

Ĉiuj salonoj en la iama Fervojista Kulturdomo (DKK) estis je nia dispono (kelkaj kunvenoj okazis en la proksima salonego de la Ĉefa Teknika Organizo).

Post la solena inaŭguro, kiun ĉestis reprezentanto de Polaj Fervojaj Linioj, kaj la malferma koncerto, oni havis la unuan ekskurson en la malnova urboparto. Fruvespere sanktan meson en la proksima templo Kristo Savanto celebris pastro Stanisław Sztolc, kaj la koruso *Hasło* kantis religiajn kantojn.

Lunde cent-persona grupo vojaĝis per vaportrajno al Wolsztyn, kie ni admiris la centjaran funkciantan vaporlokomotiv-deponejon kaj samtempe muzeon. Tie oni ankoraŭ peze laboras pretigante vaporlokomotivojn por lokaj fervoj-linioj. Ekskursoj okazis ankaŭ dum aliaj tagoj. Ni vizitis la dumiljaran arkeologian perlon Biskupin kaj rekonstruitan skansenon. De Biskupin per etŝpura trajno ni veturis al muzeo de etŝpuraj vagonaroj en Wenecja apud Żnin. En Gniezno ni vizitis la malnovan urbon kaj la insulon Lednica. En la urbeto Kórnik, kie ni admiris la kastelon de familio Działyński kaj parkon Arbotretum kun florantaj azaleoj. En la Grandopollanda Nacia Parko ni vidis miljarajn historiajn kverkojn Lech, Ĉeĥ kaj Rus — la prapatroj de slavaj gentoj.

La laborprogramo enhavis kunvenojn de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) kaj multajn fakajn prelegojn. Tiujn pri modernigo de la fervoja poznana nodo prezentis Polaj Fervojaj Linioj kaj firmao *Tales*. Kunvenis ankaŭ la terminologia sekcio. En la nova centra regejo en Poznano ni povis spekti, kiel efike funkcias la nova komputila stirado.

Dum vesperoj okazis bankedo kaj internacia balo, interkona vespero, koncertoj de la ensembloj *Bailando* kaj *Wielkopolska*, de la universala koruso k.a.

Vendrede, dum la ferma ceremonio,



la prezidanto de IFEF Romano Bolognesi dankis al LKK pro la sukcesa kongreso. La granda kongresa flago estis transdonita al organizontoj de la sekva kongreso en Triesto (Italio), kie oni festos la centjaran jubileon de IFEF. En la adiaŭa vespero en la restoracio *Oaza* kantis Zuza Kornicka kaj okazis prezentado de la defendoarto ĵuĵicuo.

Sabate plej multaj kongresanoj forveturis, kaj por 30-persona grupo komenciĝis kvintaga postkongresa ekskurso tra Toruno, Malborko, Gdanско, Olsztyn ĝis Bjalistoko.

Wiesław Libner

Semajno en Paradizo

Dum la semajno 14–20 apr 2008 okazis jam la XXVI-a lingva seminario en la Ĉeĥa Paradizo, en la vilaĝo Skokovy.

Kvardek kvar gesamideanoj (ses poloj, du francoj kaj 36 ĉeĥoj) ĝuis agrablajn medion kaj amikan etoson en la pensiono *Espero*. Dank' al klopodo de la instruantoj preskaŭ ĉiuj plibonigis siajn sciojn de la ŝatata internacia lingvo.

La plej plaĉa estis ekskurso al Jabłonec n. N. en la muzeo de vitraĵoj kaj bijuterio. Plaĉa estis ankaŭ ekskurso al Mnichovo Hradiště. La kutimajn posttagmezajn promenojn iomete malagrabiligis pluvetoj kaj malvarmo. La partoprenantoj aŭskultis kelkajn prelegojn (de abelbredado ĝis astronomio kaj esperantologio) kaj spektis filmojn. Kiel kutime, grupeto da interesitoj okupiĝis pri manlaboroj. Sukcesa estis la adiaŭa vespero kun skeĉoj, anekdotoj kaj aliaj amuzaj prezentitaj de ĉiuj partoprenantoj.

Kadre de la seminario kunvenis la estroj de AEH (handikapitoj) kun reprezentantino de Silezia Esperanto-Asocio el Vroclavo. Ili interkonsentis kunlabori, interŝanĝi gazetojn kaj informojn pri la agado de ambaŭ asocioj kaj ankaŭ traktis pri reciproka vizitado.

Pavel Nechvíle
prezidanto de AEH

Rodanalpa kongreso

Murs-Sankta-Eŭzebio (departemento Dromo) akceptis la Rodanalpan kongreson 16–18 maj 2008. Bona etoso markis tiujn tri gravajn tagojn por la 95-persona partoprenantaro. Multaj homoj substrekis tion fine de la renkontiĝo, kaj tio estas sukceso por la organizoskipo, konsistinta el la federacia komitato, aparte Monique Fillat kaj Fransŭaz Rochette.

Vendrede post la akceptoparolado de la prezidantino Claude Pépin okazis vespero pri vojaĝoj. Sabate multaj atelieroj okazis: kanto, teatro, masaĝo, komputiko kaj Esperanto, spertintersanĝoj pri vojaĝado kaj korespondado, verkado, iniciado al Esperanto, dum ok personoj trapasis (succese) ekzamenojn.

Tagmeze la vicurbestro de Murs invitis nin al aperitivo. Li diris kelkajn vortojn en Esperanto kaj donacis al ĉiu kongresano belegan libron pri la historio de Murs. Posttagmeze sekvis atelieroj kaj prelego pri botaniko far Claude Pépin.

La sabata vespero komenciĝis per teatra spektakleto, preparita de la asocioj Albertville Esperanto kaj Tarenteza Esperanto, apogitaj de la teatra ateliero. Rolande Cleizergues, kiu gvidis la atelieron, verkis tiun spektaklon — krom du scenajetoj — kaj surscenejigis ĝin. Folkloro balo sekvis animita de la grupo *Loufolk*.

Dimanĉe matene la Ĝenerala Asembleo reliefigis la rolon de la Federacio por konsistigi la ligon inter dissemittaj asocioj kaj doni al ili kelkajn sekvindajn vojojn kaj rimedojn por agadi kune kaj en siaj regionoj. Agadoj de kelkaj asocioj estas ilustritaj per lumbildoj: porĵurnulaj agadoj en kulturdomoj, amikaj konversacirenkontiĝoj por uzi la lingvon ekster la kursoj, organizado de kongreso.

Post la asembleo okazis la aŭkcio majstre estrita, kiel kutime, de Jean-Louis Gayet. La mono ĉi-jare profitos al la neregistara organizaĵo *Mazingira* en Tanzanio, fondita de esperantisto Mramba Simba.

Kvankam la vetero ne estis tre bela ĝis tiam, la pikniko estas inundita de abunda suno sur la ekstera ludejo. Posttagmeze, dum la kant-ateliero okazigis sian lastan seancon, kelkaj povis aerumiĝi dum aliaj vizitis la sanktartan muzeon de Murs. La kongreso finiĝis posttagmeze per amikecstrinkado kun la kantoj akompanataj de la akordeono de Fransŭaz...

Philippe Pellicier

Informoj el la Esperanto-urbo

Kvar oficialaj bonvenigaj ŝildoj en Esperanto estis fiksitaj al la germanaj kaj nun ili estas bone videblaj de ĉiuj, kiuj venas per aŭto al Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo. Ili troviĝas urborande (vd. dekstre) en la direktoj Pöhlde (resp. Duderstadt), Göttingen (ĉe la forte frekventata federacia vojo 27), Osterode am Harz (federacia vojo 243) kaj Herzberg-Sieber (resp. St. Andreasberg). Ĉiu aldona Esperanto-ŝildo el dura kverkoligno, kiujn la urbo financis, kostis po ĉ. €750.

En Herzberg nun funkcias kelkaj lernejoj Esperanto-grupoj: en la loka gimnazio du grupoj, po unu en la meza lernejo kaj en la du bazaj lernejoj. En du lernejoj estas videblaj ekspozicioj pri Esperanto kaj pri la lernejoj kontaktoj per Esperanto.

Delegacio de la baza lernejo el Bar Hill ĉe Cambridge (Britio), lernejo por Springboard-projekto, kun Claire White kaj Tim Morley vizitis Herzberg kaj la bazajn lernejojn por esplori komunajn projektojn rilate al instruado de Esperanto kun internaciaj kulturinterŝanĝoj en la bazaj lernejoj de ambaŭ urboj. La britaj lernantoj kune kun gepatroj kaj geinstruistoj venos fine de aŭgusto 2008 al Herzberg!

Lerneja delegacio el Rybnik (Pollando) vizitis nian Esperanto-Centron kaj kontaktis lernejojn en Herzberg. Krome ili prezentis sian urbon, lernejojn kaj belan kulturprogramon en la Domo de la Renkontiĝo dum Interkultura Vespero. Ili ŝatus havi konstantan partneran bazlernejojn en Herzberg aŭ najbara urbeto. La Esperanto-grupon kun la instruistino Teresa Konsek akceptis la urbestro Gerhard Walter.

Delegacio el la Esperanto-urbo Herzberg vizitis la polan ĝemelurbon Góra, kun Marika Frense, Otto Kern kaj Andres Diemel (GEJ-reprezentanto) kune kun niaj du gastoj el Koreio s-ino Sonĝula kaj s-ro Lumturo. Dum aŭgusto 2008 okazos la tria komuna feriosemajno por gelernantoj de ambaŭ urboj surbaze de Esperanto en Jemiarno ĉe Góra en Pollando.

En la ĝardeno de Esperanto-Centro ne nur pompas multaj floroj sed ekzistas speciala terasbedo kun vintroduraj agavoj kaj kaktoj kaj ankaŭ la famaj flavkoloraj kaj bonodoraj Esperanto-rozoj (kiuj nun aktive floradas) kaj la nova Esperanto-klematito kun grandaj violetaj petaloj.

GEC/ICH



En internacia etoso translima

Sabaton (19 apr) la Esperanto-Grupo Essen (Germanio) invitis siajn nederlandajn partnergrupojn el la brabantaj urboj Eindhoven kaj Helmond al ekskurso tra la belega pejzaĝo de la Ruhr-valo ĉe Essen-Werden. Ili daŭrigis serion de reciprokaj vizitoj dum unutaga esperanto-aranĝo.

Jam dufoje la nederlandanoj invitis la esperantistojn el la Ruhr-regiono, kaj nun la germanoj por la dua fojo invitis al Translima Renkontiĝo Esperantista de la Esperanto-Grupo Essen, mallonge TRE-EGE. Dum TRE-EGE 1 Ludger Schméink montris al la nederlandanoj la iaman karbominejon kaj la nunan mondkulturajn heredaĵojn Zollverein. Ĉar tiu ĉi reprezentas la malbelan, industriaran parton de Essen, TRE-EGE 2 do esploris la belan flankon de la urbo.

En la iam memstara urbeto Werden, pli aĝa ol la urbego Essen, oni vidis la 12-jarcentan bazilikon kaj barokan palacon kaj vizitis la Lucius-preĝejon, la plej malnovan parokan preĝejon norde de Alpoj, kiun oni ekkonstruis en la jaro 995.

Dum la tagmezo la internacia rondo piknikis sur la insulo Brehm meze de la rivero Ruhr — bona okazo por babili kaj ĝui la sufiĉe bonan, tamen malvarmetan veteron. Poste la internacia rondo promenis kontraŭflue laŭlonge de la riverbordo. Por kafumi la esperantistoj eniris ĉebordan kafejon, ekde kiu ili povis rigardi sur la bela pejzaĝo.

Post tio la grupo trapromenis la urbeton Werden kun kradtrabaj domoj, malgrandaj butikoj kaj kafejoj. Vespere ili sidis en picejo por manĝi itale kaj babili. Ĉiuj estis kontentaj, kaj Ralph Schmeits invitis la germanajn esperantistojn al Helmond venontan septembron.

Tiuj ĉi reciprokaj vizitadoj estas bona ekzemplo por tio, kiel ni povas utiligi la internacian lingvon kaj krei internacian etoson transliman, sen vojaĝi al malproksimaj landoj.

Ludger Schméink

EDE refondiĝas en Germanio

14 jun renkontiĝis en Wiesbaden (Germanio), ses esperantistoj por prepari la refondon de la germana sekcio de la partio EDE (Eŭropo — Demokratio — Esperanto).

En harmonia kaj konstruiva atmosfero ni priparolis la formalaĵojn kaj diskutis pri niaj celoj. La ĉefa decido estis, ke la germana EDE-sekcio refondiĝos 5 jul. Ĝi estu registrata ĉe la tribunalo de Wiesbaden aŭ Frankfurt. Post la fondokunveno ni starigos nian liston, kies unua kandidato pretas esti prof. d-ro Reinhard Selten, nobelpremiito pri ekonomiko de 1994.

Nia listo havu minimume kvin, sed prefere dek aŭ pli da kandidatoj por la Eŭropa Parlamento, kaj certe sufiĉe da homoj ŝatus esti tiaj kandidatoj. La nomo de la listo (Eŭropa — Demokratio — Esperanto) kaj la nomoj, titoloj kaj profesioj de la unuaj dek kandidatoj aperos sur ĉiuj (pli ol 60 milionoj) balotiloj.

Nia ĉefa obstaklo estas la necesa kolektado de 4 000 subtenaj subskriboj (kun konfirmo de la diversaj urbaj administrejoj, ke la subskribintoj havas la rajton voĉdoni), sed ni estas tre optimismaj, ke ni venkos ĝin: tuj post kiam la gvidanto de la eŭropaj balotoj en Germanio estos akceptinta nian statuton kaj nian liston, ni rajtos ekkolekti la subskribojn; ni do havos sufiĉan tempon ĝis aprilo 2009.

Alloga estas regulo pri financado de partioj en Germanio: ĉiu partio aŭ organizo, kiu akiras pli ol 0,5% de la voĉoj en eŭropa baloto, ricevas financan subtenon de €4,25 por ĉiu voĉo. Tio signifas ke, se EDE (Germanio) ricevos en 2009 pli ol 130 000 voĉojn, ĝi ricevos por la jaroj 2009–2014 subvenciojn de entute pli ol 500 mil eŭroj.

Ulrich Matthias

Propagandi Esperanton en ESF

5 jun mi registris nian seminarion ĉe la Eŭropa Socia Forumo, kiu okazos 17–21 sep en Malmö (Svedio) en kunlaboro de EEU, DEA kaj SEF. Seán Ó Riain prelegos pri “Egalkondiĉa interkultura dialogo en tutmondiĝa malneto”. Ni mendos ankaŭ budon, kaj mi petas ĉiujn eŭropajn Esperanto-asociojn sendi informmaterialon en sia propra lingvo (20–30 ekz.) al mia adreso: Ileana Schröder, Vestavej 4, DK-2770 Kastrup, Danlando

Ileana Schröder

Nordorienta kongreso en Harbino

La 5a Esperanto-Kongreso de Nord-oriento de Ĉinio okazis 17–18 maj en Harbino, la ĉefurbo de provinco Heilongjiang, Ĉinio. Kongresis en la hotelo *Sungsan* pli ol 130 esperantistoj, inkluzive de gastoj el Ruslando (26 personoj el Vladivostoko), Koreio kaj Kanado — tio faris tiun ĉi regionan kongreson internacia, aŭ pli trafe, interpopola.

La interkonan vesperon (16 maj) antaŭis alvoko de Jiang Limin de ĈEL-officejo, sekve de kiu kongresanoj monofaris por suferantoj en la granda tertremo en Siĉuano.

La inaŭguro, prezidata de s-ano Shi Chengtai, okazis en salono *Zamenhof* antaŭtagmeze 17 maj. En la sama salono pri la kongresa temo “Per Esperanto por Konstruado de la Harmonia Socio” prelegis veterana s-ano Li Sen. Kongresanoj diskutis varme kaj vigle.

Prof. Lee Jung-kee prelegis pri la nuntempo kaj estonteco de la Azia Esperanto-movado; Zhang Jiping prelegis pri la ĉina tradicia luktarto Taiji, kaj Wang Tianyi prelegis pri la deveno de familio Zamenhof.

Prof. Laŭlum en la salono *Elpin* prezidis la seminarion pri la instruado de Esperanto, kiu tre interesis gestudentojn, kiuj eklernas Esperanton en kurso de Heilongjiang-a Scienc-teknika Instituto nur ekde ĉi-semestro, instruata de profesoro Song Ping, prezidantino de LKK. En la paroliga kurso kanada juna s-ano Martin vigle gvidis kursanojn ĉeestantajn ekparoli esperante.

Dum la kunsido pri laboro de Esperanto-Asocioj (en salono *Verda Majo*), kiun prezidis prof. Liu Zhengkun, oni laŭdis la Esperanto-instruadon en altlernejoj. Kaj la kunsidon de Ĉina Fervojista E-Asocio kun multaj ĉeestantoj prezidis Li Sen.

18 maj en la fermo prof-ino Song Ping diris fine: “Tempo senkomplete fluas, tamen nia amikeco restas eterne en nia koro! Ĝis revido!”

Post la fermo la kongresanoj vizitis la pitoreskan insulon Suno ĉe rivero Songhua, la Centran Straton, monumenton kontraŭ inundo, katedralon Sankta Sofia, konstruitan de rusortodoksoj kaj aliajn vidindaĵojn.

Post la kongreso esperantistoj el Koreio vizitis la tombon de Verda Majo en la urbo Jiamusi, akomplete de Song Ping kaj Li Renzhi (Eruda), prezidantino de Hongkonga Esperanto-Asocio.

La 6a Nordorienta Kongreso okazos en la urbo Dandong, aŭguste de 2010.

Shi Chengtai

Kantoo-Kongreso en Tokio

25 maj ĉ. 100 esperantistoj partoprenis Kantoo-Esperanto-Kongreson en Tokio, organizitan de Kantoo-Esperanto-Ligo, kiu teritorias Tokion kaj ĉirkaŭajn guberniojn.

Antaŭtagmeze okazis inaŭguro kaj kvin fakkunsidoj (kanto “Sonorilo de Paco”, etnaj muzikiloj, porgeknaba komputilo, vizitoj al Edo-epoka muzeo kaj Modernarta muzeo).

Posttagmeze prelegis Aleksandra Watanuki (polino edziniĝinta al japano) pri japanaj komiksoj “manga” en Pollando. Ges-roj Watanuki eldonas japanajn manga-ojn en Pollando, sed tio estas tre malfacila, ĉar multaj poloj opinias, ke komiksoj estas amuzaj nur por infanoj.

Post la prelego okazis ekskurso ĉirkaŭ la kongresejo. Ni vizitis ĝardenon Kijosumi kaj ĝuis la japanecan ĝardenon. Kiel la kongresa memoraĵo eldoniĝis *Raportoj el Japanio 11* verkita de Hori Jasuo.

Hori Jasuo

Go-konkurso en Japanio

19–20 maj okazis esperantista konkurso de goo en la Esperanto-Domo de Jacugatake, Japanio, organizita de Japana Esperantista Go-Asocio. Dek esperantistoj partoprenis kaj ludis kontraŭ ĉiuj. Tiu asocio organizas go-kunsidon ĉiumonate, kaj en januaro kaj en majo ĝi organizas konkurson. En la UK en Roterdamo ĝi havos go-kunsidon kaj atendas partoprenon de la kongresanoj.

Hori Jasuo

ARKONES vokas artemulojn

Ni invitas ĉiujn ŝatantojn de arto kaj kulturo al la XXIV-aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto ARKONES, kiuj sub la aŭspicioj de Pola Esperanto-Junularo okazos 19–21 sep en Poznań (Pollando).

La programo estos tre riĉa kaj ni garantias plenan kontentigon. Kiel kutime oni povos partopreni koncertojn de la plej bonaj kaj bravaj artistoj, interalie, Alejandro Cossavella (*La Porkoj, Strika Tango*), Ĵomart kaj Nataša kun Carina, *Perdita Generacio*, Jarlo Martel-Monto, Oksana Mirgorodskaja kaj multaj aliaj, spekti filmojn, partopreni multajn interesajn prelegojn kaj ĝui la plej esperantistan koridoran etoson.

ARKONESejo, la arta lernejo kun ĉarmaj salonoj, troviĝas proksime al la plej granda parko en Poznań kaj proksime al la urbocentro, do oni povos malkovri lokajn allogaĵojn.

Antaŭ ARKONES (13–17 sep) okazos studsesio de Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz kaj 18–19 sep okazos Interlingvistika Simpozio omaĝe al la dekjarigo de la Studoj (<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/>).

Vi povas aliĝi al Arkones ĉe www.arkones.org. Pliajn informojn petu rete:

 arkones@esenco.org



Du eventoj dum unu semajfino

3 maj Korea E-Asocio festis la 10an Tagon de Pioniro en la Ŝtata Universitato Kyungbook en Taegu, omaĝe al karmemora d-ro Lee Chong-Ha (Kunpo, 1913–2007). 85 homoj ĉeestis inkluzive de la familianoj kaj iamaj kolegoj de la honorata pioniro, kaj 22 japanaj esperantistoj.

D-ro Lee Chong-Ha estis profesoro pri juro en la universitato Youngnam. Li lernis Esperanton en la 1930aj jaroj, kaj ĉefe aktivis por unuigi siatempe la dividitajn organizaĵojn de Esperanto-movado post la korea milito. En la 1980aj jaroj li subtenis revivigon de Esperanto-movado de Busan.

La partoprenantoj estis regalataj de la familio de la omaĝata pioniro per tagmanĝo. La familio de la pioniro favoranta al KEA financis kune kun KEA-membroj la eldonon de la memorlibro *Amiko de Popolo Kunpo Lee Chong-Ha*, kompilita de Jang Jeong-Ryeol.

KEA festas la Tagon de Pioniro en ĉiu majo kaj eldonas memorlibron pri la prilumata pioniro. Ĝin iniciatis d-ro Lee Chong-Yeong en 1999, kiam li estis prezidanto de KEA, por ke oni memoru la kontribuon de forpasintaj pioniroj, kiuj aktivis por korea Esperanto-movado.

Dum la unua maja semajfino okazis ankaŭ la komuna kurskunveno de Namkang-a Esperanto-Lernejo (NEL) kaj la 40a Friska Lernejo de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG). En NEL, kiu situas en la vilaĝo Gakbuk en Cheongdo (Koreio) kunvenis 95 esperantistoj: 71 koreoj, 23 japanoj kaj 1 belgo.

Okazis 4 kursoj: “Elementa kurso por koreoj kaj japanoj” (Kong Gil-yun), “Post baza kurso” (Lee Jung-kee), “Konversacio kaj kanto” (Ma Young-tae) kaj “Ridante lernu” (Sato Morio kaj Kim Uson).

Pri la temo “Kia diferenco estis en la postmilita likvido inter Germanio kaj Japanio?” prelegis Sato Morio — unu el la tradukintoj kaj ĉefroluloj de *Historio por Malfermi Estontecon: Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio*.

En la interkona vespero, kiun gvidis Park Yongsung, oni babilis, ŝercis, dancis kaj kantis belajn kantojn Esperantajn kaj esperantigitajn el la japana kaj korea kun akompano de kanteja muzikilo. Kaj oni sate ĝuis bongustajn krudfiŝaĵojn, per kiu d-ro Park Wha-Chong, prezidanto de NEL, riĉe regalis la partoprenantojn.

Min Hyeonkyeong, Kim Uson



La Civito aktivis en Vilno

Tria ordinara kaj kvaruma kunveno de la Kapitulo de la Esperanta Civito dum ĉi tiu mandato, sub la prezido de la Konsulo, Giorgio Silber, okazis 28 maj en Vilno.

La Kapitulo ekzamenis la evoluon de la situacio en Esperantio, kompletigante la pritrakton de la tagordo kiu pasintfoje ne estis elĉerpita. La prokuristo de la Civita banko prezentis la ĵus produktitan unuan medalon (kaj moneiron), el pura arĝento, honore al la jubileo de Lazaro Ludoviko Zamenhof; apartan atenton ricevis la projekto Amahoro (Civito de Paco) en Burundio, kiu naskis la decidon sendi tien la vickonsulinon pri la Tria Mondo (Chamberline Nguéfac) kun alia civitano, kompetenta pri investoj en Afriko.

La Kapitulo aprobis la gvidlinion por la apliko de la direktivo Rogora (Komuna Biblioteka Integrita Sistemo), kiu konkretiĝos en specifa dokumento de la vickonsulo pri kulturaj aferoj, sen. Ljubomir Trifonĉovski. Pliaj punktoj en la agendo estos traktataj en apartaj gazet-araj komunikoj.

Laŭ propono de la Esperanta Civito, okaze de la unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Jurnalistoj en Vilno gesinjoroj Ranieri Clerici, Claude Nourmont, Barbara Pietrzak (estraranoj de UEA) kaj Giorgio Silber, Bertil Nilsson, Ljubomir Trifonĉovski (kapitulanoj de la Esperanta Civito) havis neformalan renkonton, kiu pasis dum ĉ. tri horoj en serena kaj sincera etoso.

Komence oni interparolis pri esperantistoj en prizono: sekve laŭ interkonsento la estraranoj de UEA ricevos

dosieron de Komitato Armand (pri esperantistoj en prizono). Menciante publikajn politikajn deklarojn jen de landa asocio jen de prezidinto de UEA, la interparolo enfokusigis pri la publikrilata strategio de UEA kaj la eksteraj rilatoj de la Esperanta Civito.

Estis aluditaj ankaŭ la rilatoj inter UEA kaj diversaj establoj aliĝintaj al la Pakto. La interparolo turniĝis fine al la temo “lingvotestado”, kun analizo de respektivaj vidpunktoj.

HeKo

La Esperanta PEN assembleis

La esperanto-literaturo estos reprezentata en la PEN-mondkongreso en Bogoto, meze de septembro 2008, malgraŭ la alvoko de la Franca PEN bojkoti la kongreson en Kolombio. “Tamen estas kondiĉo: unusola delegito por la Esperanta PEN, en la persono de kolego Koffi Gbeglo, se PEN Internacia subvencios lian vojaĝon kaj liajn kostojn, kiuj estas tro altaj por malriĉa centro kiel la nia”, — atentigas sen. Ljubomir Trifonĉovski, ĵus reelektita kiel sekretario por la mandato 2008–2010, okaze de la Asembleo de la Esperanta PEN (29 maj 2008 en Vilno).

La nova prezidanto de Esperanta PEN-Centro estas sen. Perla Martinelli, la nova vicprezidanto c-ano György Nanofvszky.

La Asembleo decidis unuanime reproponi ankaŭ dum la venontaj jaroj d-inon Marjorie Boulton por la literatura Nobel-premio, kaj diskutis diversajn interesajn proponojn por la estonta aktiveco.

HeKo



Esperanto kiel konkurslingvo

La prestiĝa regiona fremdlingva konkurso por lernejoj okazis maje en Krakovo (Pollando). Ĉirkaŭ mil lernantoj prezentis artajn programojn en unu el la lingvoj: angla, germana, franca kaj Esperanto.

En Esperanto konkursis lernantoj el kvar lernejoj (same en la franca). La organizantoj emfazis, ke Esperanto ĉiujare estas konkurslingvo, dum, ekzemple, la rusa kaj la itala lingvoj, instruataj en lernejoj aperas malofte. Tio estas pruvo de tre bona laboro de aro da Esperanto-instruistoj en suda Pollando.

Ilia persista kaj sindediĉa laboro alportis rezultojn: dum la antaŭaj jaroj pluraj lernejoj gajnis la unuan premion en la kategorio Esperanto (kaze de nesufiĉe alta nivelo premioj ne estas aljuĝataj). La ĉi-jara sukceso estas pli granda: unuafoje oni prezentis Esperanto-programeron dum la fina Solena Koncerto, kiel unu el la tri plej sukcesaj prezentadoj el inter ĉiuj lingvaj kategorioj.

Maria Majerczak

Junulara movado en Pollando

Fine de majo en la somera dometo de *Varsovia Vento* okazis la sepa kunveno de la Pola Esperanto-Junularo. Ĝi komenciĝis per prezento de Łukasz Korczewski pri rezultoj de enketado pri Esperantaj aranĝoj. Sekvis raporto de Tobiasz Kaźmierski pri eventoj, kiujn partoprenis PEJ-membroj. Temas inter alie pri la Ekonomia Forumo en Krynica, kie PEJ prizorgas Esperanto-standon. Łukasz Żebrowski kaj Agnieszka Rzetelska raportis pri komunaj kunvenoj de Pola kaj Germana Esperanto-

Junularoj en Poznano kaj en Herzberg. La duan kunvenon financis Pola-Germana Junularfonduso.

Por la periodo 2008–2010 estis elektita nova estraro: Łukasz Żebrowski (prezidanto), Agnieszka Rzetelska (viceprezidanto), Justyna Rusznica (sekretario), Leszek Dobrowolski (kasisto) kaj Łukasz Korczewski (reta agado).

La novan estraron atendas du laborplenaj jaroj — tuj post la elekto oni priparolis realigendajn projektojn. Łukasz Żebrowski prezentis okazontan en aprilo 2009 seminarion de PEJ kaj E@I. Sekve li prezentis staton de preparlaboroj por la 65a Internacia Junulara Kongreso en Liberec, kiun organizos kune Pola, Ĉeĥa kaj Germana Esperanto-Junularoj. Fine okazis diskuto, kiun gvidis Ireneusz Bobrzak, pri planoj de PEJ por la venont-jara Universala Kongreso en Bjalistoko.

Łukasz Żebrowski

La nova estraro de PEJ (de maldekstre): Łukasz Korczewski, Agnieszka Rzetelska, Łukasz Żebrowski, Justyna Rusznica, Leszek Dobrowolski.



Eventoj

Pokalo Kostrena 2008

Kroata Esperanto Ligo (KEL) kaj Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) kunlabore kun Esperanto Societo Rijeka, gastiganto de la projekto, okazigis la sepan sinsekvantan Konkurson pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj lernejoj. La konkurso, kiu okazis 16–18 maj 2008 en la skolta restadejo *Esperanto Domo* en Kostrena, subvenciis departamento pri klerigado kaj lernejoj de Rijeka.

La unuan tagon, vendredon, gelernantoj eluzis ĉefe por bani sin en la maro. Vespere ĉiuj partoprenantoj ricevis saketojn kun donacoj de la gastiganto. Gajan interkonan vesperon organizis membroj de la Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA).

La konkurso mem okazis sabate. Dum la konkursa komisiono trarigardis skribitajn testojn, la gelernantoj distriĝis je duontaga ekskurso en Crikvenica. En tiea haveneto atendis nin ŝipo kun fenestroj en sia fundo por spekti fundon de la maro. Vespere KEJA okazigis amuzegan kvizon kaj disdonis premiojn al la gajnintoj.

Dimanĉe la komisiono proklamis la venkintojn de la konkurso:

Kategorio A (komencantoj)

1. Dorotea Martinec (Lernejo *Mladost*, Zagreb)
2. Petra Sarić (*Mladost*, Zagreb)
3. Danijel Hrvatin (*A. Mohorovičić*, Matulji)

Kategorio B (progresantoj)

1. Tena Kuzmanović (*Retkovec*, Zagreb)
2. Nikolina Gegić (*Retkovec*, Zagreb)
3. La tria premio ne estas atribuita.

Pokalon Kostrena 2008 por la plej bona lernejo ricevis elementa lernejo *Retkovec* (Zagreb).

Rangigitaj lernantoj kaj la plej sukcesa lernejo estas premiitaj per pokaloj kaj diplomoj. Medalon por la plej junaj konkurantoj ricevis Danijel Hrvatin kaj Marija Gegić el *Retkovec*.

Ĉiuj partoprenantoj ricevis dankesprimilojn de la gastiganto. UPE donacis al ĉiu lernanto ekzempleron de la porinfana libro *Kamaradaro de Petro Nodeto* de kroata verkisto Mato Lovrak. UPE premiis po du plej sukcesajn lernantojn en ambaŭ kategorioj per partopreno je Internacia Infana Kongreseto 2008 en Nederlando, danke al la financa subteno de Ministerio pri Klerigado, Kulturo kaj Sporto.

Emil Hrvatin

Centjariĝo en Kroatio

Kroata Esperanto-Ligo organizis fine de majo kelkajn eventojn omaĝe al la centjariĝo de la unua tutkroata Esperanto-asocio, fondita en 1908.

La plej granda evento okazis 26 maj en la koncertejo Vatroslav Lisinski, kiu akceptis la UKon en 2001. Por la solena koncerto venis ĉ. 1500 spektantoj el diversaj partoj de Kroatio.

Dum pli ol duhora programo scenoj el la historio de Esperanto en Kroatio estis ilustritaj per koncertaj muzikeroj. La koncerton komencis omaĝo al Osiĵek, kie knabinoj ekuzis Esperanton en 1889. Sekvis saluto al Rijeka, kiu havis la unuan Esperanto-klubon en 1907. Por tiuj eventoj muzikis zagreba Ensemblo *Angeluši*. La kunlaboron kun *Literatura Mondo* ilustris muzika prezento de Attila Schimmer. La agadon de Tibor Sekelj en Sud-Ameriko prikantis ensemblo *Ayllu*. Someran Esperanto-Kursejon en Primošten voĉe prezentis muzikgrupo *Klapa Fibula*. Vida Jerman, kiu gvidis la programon, kantis kanzonon el la literaturoj kroata kaj la brazila. Neven Mrzlečki per *Serenado* de Schubert kaj per sia propra *Nostalgio* prezentis evoluon de la Zagreba instrumentado. La lernejan agadon prezentis gaja grupo el la lernejo Davorin Trstenjak.

Virina voĉa ensemblo *Ezerki* kun orkestro *Sedum Osmi* impone finis la plej multnombrian kroatan Esperantan feston, en kiu esperantistoj renkontiĝis kun amikoj de Esperanto en komuna muzika plezuro.

La koston koncertejon financis la urba oficejo pri klerigo, kulturo kaj sporto, la artistoj prezentis senpage. Ministro pri kulturo sendis sian reprezentanton por omaĝi al la jubileo.

Samtage en Muzeo Mimara malfermiĝis ekspozicio de Esperantaj filatelajoj, prizorgata de Nikola Turk.

29 maj en la ejoj de Sveučilišna knjiĉara kadre de Nacia kaj universitata bibliotekoj okazis libroekspozicio pri la Esperanta libroeldonado en Kroatio de 1909 ĝis nun. En la ekspozicio Spomenka Ŝtimec prezentis la projekton de KEL, financatan de Eŭropa Komisiono.

La eventoriĉa semajno finiĝis 31 maj, kiam en la bieno de Spomenka Ŝtimec gastis du verkistoj Luko Paljetak kaj Zvonimir Mrkonjić kadre de Meteorita festo en la vilaĝo Hraščina. Sepdeko da spektantoj venis aŭskulti la versojn de eminenta kroata poeto Luko Paljetak, kiu en pasintaj jaroj diversmaniere kunlaboris kun esperantistoj kaj kies versoj legeblas ankaŭ en Esperanto.



Vida Jerman kantas en Zagrebo

La festado ne finiĝis: ĝi kontinuos en novembro per scienca simpozio pri Esperanto en Zagreba Filozofia fakultato kaj havos sian finan programon en decembro 2008.

Spomenka Ŝtimec

Ĉu UK en Moskvo?..

17–21 maj 2008 en Moskvo restadis la Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller por inspekti pretecon de Ruslando okazigi Universalan Kongreson de Esperanto.

Lin kaj kelkajn esperantistojn akceptis unu el la moskvaj vicurbestroj, Anatolij Petrov, kaj reprezentantoj de la internacia kaj kleriga fakoj de la urbestro. Petrov invitis, nome de la urbestro Luĵkov, ke UEA kongresu en 2010 en Moskvo. Je ĉiuj antaŭpreparitaj demandoj li plenkonfide respondis, ke tio estas facile solvebla kaj ne estas problemo. La preparado de la teknikaj kondiĉoj de la invito estis komisiita al la kleriga fakoj.

La urbestro ankaŭ aranĝis vespermanĝon por Osmo Buller kaj liaj akompanantoj en la restoracio *Villa Rosa*. La vespermanĝo pasis, kiel oni diras en protokoloj, “en varma kaj amikeca etoso”. Fine la oficistoj jam tute senĝene rakontis pri la specifajoj de moskva burokrata maŝino kaj ĵuris ellerni Esperanton kaj lanĉi la instruadon de la lingvo en ĉiuj lernejoj de Moskvo.

Krome, Osmo Buller ekskursis, prelegis pri UEA al studentoj de universitato “Justo”, vizitis eventualajn kongresejojn kaj renkontiĝis kun moskvaj esperantistoj.

Andrej Grigorjevskij

Laŭ *Esperanto-rus-informoj*

Unufraze

★ Ministro pri eksterlandaj aferoj de Hungario, d-rino Göncz Kinga, akceptis esti protektanto de la ĉi-jara IJK en Szombathely, Hungario. (Ret-Info)

★ La urbestro de Vraco (Bulgario) atribuis al aktiva e-isto Bojĉo Mladenov la Grandan Civitan Premion, pro lia E-agado; li dum kelkaj jardekoj instruis Eon en la gimnazio, fondis k gvidis la unuan en Bulgario lernejan E-societon *Verda Raketo*. (HeKo)

★ 3 jun en populara germana gazeto *Spiegel* aperis artikolo de Joachim Hoelzgen pri kontraŭglobalisma agado de la Libera E-Asocio en Hokkajdo k de aliaj E-anarkiistoj, i.a., de Martin Krämer, al kiu oni malpermesis eniron en Japanio. (Sabine Hauge)

★ Irana Korana NovaĝAgentejo IGNA faris intervjuon kun Reza Torabi pri la E-traduko de la Korano; amaskomunikiloj disvastigas ĝin. (Landa Agado)

★ Societo Franz Kafka en Prago eldonis ĉeĥlingve romanon *Vizito el prahistorio* de Petr Ginz, juda ĉeĥia e-isto, kiu mortis 16-jara en 1945 en gaskamero; unu el la herooj de la romano, inspirita de Jules Verne, estas e-isto. (Miroslav Malovec)

★ SAT sendis leteron al Bernard Kouchner, ministro pri eŭropaj k eksterlandaj aferoj de Francio, alvokante ke Francio aliĝu al kampanjo pri malpermeso de pafaĵojetoj el bomboj. (*Sennaciulo*)

★ La anarkiisma ĵurnalo *Cultura Obrera* (Laborista Kulturo) en Majorko eldonis sian kalendaron por 2008 en la kataluna lingvo k en Eo. (*Kataluna Esperantisto*)

★ Por OSIEK-premio estas proponitaj: Albrecht Kronenberger pro *Adoru*, Josip Pleadin pro *Ordeno de Verda Plumo*, Sergio Pokrovskij pro *Komputika Leksikono* k *La Majstro kaj Margarita* (Bulgakov), Baldur Ragnarsson pro *Sagao de Njal* k Spomenka Ŝtimec pro *Kroata milita noktlibro*. (*La Gazeto*)

★ 14 jun je 102a datreveno de Japana E-Asocio, en la sidejo de Japana E-Instituto en Tokio okazis publika Tago de Eo kun prelegoj de Tanaka Katsuhiko k Kimura Goro Christoph. (Landa Agado)

★ La ĵurio de la literatura konkurso *Abitus-2008* aljuĝis la unuan premion por poezio al Benito Philippe (Germanio), duajn premiojn al Jaroslav Krolupper (Ĉeĥio) k Penka Papazova (Bulgario); trian premion al Elena Popova (Bulgario); trian premion por humuraĵoj ricevis Zorka Vinceljak (Kroatio). (HeKo)



Pri jubiloj kaj jubileoj

Centjariĝoj estas hazardoj de la tempo: UEA 99-jara kaj UEA 100-jara estas tamen la sama organizaĵo. Sed centjariĝoj estas bonaj okazoj por inventari la atingojn kaj listigi la aferojn ankoraŭ neatingitajn. Ili estas ankaŭ bonaj okazoj por mediti pri la malsukcesoj kaj parkeri iliajn lecionojn. Kaj foje ankaŭ por jubili pro sukcesa transvivo....

Bedaŭrinde mi tro malfrue reagis al la invito de la redaktoro de *La Ondo de Esperanto*, ke mi skribu miajn respondojn al liaj kvar demandoj pri UEA: (1) Kiun lokon UEA okupas en kaj ekster la Esperanto-komunumo? (2) Kiuj pozitivaj ecoj de UEA estas konservindaj? (3) Kion oni ŝanĝu? (4) Ĉu temas pri la sama organizaĵo kiel tiu fondita en 1908?

Leginte la naŭ respondojn de aliaj invitoj, mi trovis ilin pensinstigaj — kaj instigaj ankaŭ al kelkaj replikoj.

Kvankam Giorgio Silfer opinias, ke UEA rilatas al la lingvo Esperanto kiel British Council rilatas al la angla lingvo, tiu karakterizo neniel kaptas la centrecon de UEA ene de la Esperantomovado. UEA organizas la Universalan Kongreson, kiu estas pli granda manifestiĝo de la esperantistoj ol ĉiuj aliaj Esperantorarangoj, kaj pli granda stabiliga faktoro en la parola kulturo de Esperanto ol ĉio alia. UEA funkciigas la plej grandan libroservon en Esperantujo (aŭ *Esperantio* — kio ŝajne tamen signifas ion tute specialan en la rondoj de Giorgio Silfer, alian ol *Esperantujo*). Ĝi aŭspicias la plej signifan renkontejon de sciencistoj pri Esperanto kaj interlingvistiko — CED, kiu organizas la Nitobeseminariojn (plej laste en Tokio pasintjare) kaj aliajn aranĝojn (en julio ĝi okazigos ĉe la Universitato de Amsterdamo konferencon de universitatoj en kiuj Esperanto kaj interlingvistiko estas instruataj). CED publikigas la sciencan revuon *LPLP*, ĝi subtenas partoprenon de fakuloj en fakaj konferencoj, ĝi subvencias esplorojn, kaj ĝi aperigas la internan ligilon *Informilo por Interlingvistoj*. La junulara organizaĵo TEJO laboras sub la ŝildo de UEA kaj kun ĝia financa subteno. La eldona fakto de UEA estas unu el la plej grandaj en la Esperanto-mondo — ktp. ktp. Ĉe UN kaj Unesko, Esperanto estas reprezentata ĉefe pere de la reprezentantoj de UEA, kiuj en aprilo 2008, por marki la centjariĝon de UEA, organizis kolokvon en la UN-sidejo en Ĝenevo (kie la fantoma ĉeesto de Edmond Privat kaj Hector Hodler estas eble ankoraŭ sentebla). Se UEA ne ekzistus, oni devus inventi ĝin.

Ĝi kompreneble ne faras ĉion ĉi perfekte. Foje eĉ male. Kiel legantoj de mia lastatempa libro *Lingvo kaj popolo* certe scias, mi estas forta kritikanto de la strukturoj kaj labormetodoj de UEA. La Universalaj Kongresoj ankoraŭ funkcias laŭ malnova ŝablono; la Asocio dediĉas tro da atento al servoj al la membroj kaj maltra la tempo al disvastigo de Esperanto kaj al kunordigo de siaj konsistaj partoj; ĝenerale oni laboras en la Asocio laŭ organizaj metodoj ĝisdataj en la postmilitaj jaroj sed nun nepre eksmodaj. Multloke en la mondo, membraraj organizaĵoj, financataj de membrokotizoj, estas en krizo; kampanjaj organizaĵoj, kiuj laboras por atingi specifajn celojn specife difinitajn, per kampanjoj financataj de tiuj, kiuj interesiĝas, plejparte floras. En ĉiu ajn organizaĵo, kampanjoj stimulas; sed servoj al la membroj kondukas ĉefe al plendoj pri nelivero de la asocia revuo aŭ preseraroj en la Jarlibro (tio estas ĉar la unua kreas aspirojn dum la dua premisas maksimume kontentigon).

Kiel pluraj respondantoj atentigis, la UEA de 1908 estis organizaĵo de unuopaj membroj, dum la nuntempa UEA, rezulte de la

skismo de la 1930aj jaroj kaj refandiĝo de la 1940aj, estas nun ia kompromiso inter individua membraro unuflanke kaj aro de landaj kaj fakaj asocioj aliflanke (Renato Corsetti, eble prave, nomas tiun kombinon “io pozitiva”).

La nuna statuto de UEA, super kiu mi laboris en la jaroj 1974 ĝis ĝia akceptiĝo en 1980, teorie rekonas tiun kombinon, sed ĝia efikeco dependas de la efika laboro de la diversaj organoj de UEA.

Gbeglo Koffi prave plendas pro la relativa nelaboro de la Komitato, la gvida organo de la Asocio. Tiu manko de decida interveno en la aferoj de la Asocio fontas el pluraj faktoroj, el kiuj la ĉefa estas la simpla fakto, ke la Komitato renkontiĝas nur unufoje jare, ĉiam sub premo de tempo, tiel ke la komuna fido necesa por bona komuna laboro apenaŭ havas tempon ekesti. Inter la komitatataj kunsidoj, oni malmulte instigas la komitatanojn al akurata kaj decida laboro, kaj la komitatanoj siavice malmulte sentas sian respondecon. Iom simila situacio regas ĉe la estraro kaj ĉe aliaj organoj de la Asocio. En tiu vakuo, la Centra Oficejo vole-nevole prenas gvidan rolon. Gbeglo Koffi supozas, ke tiu malekvilibro fontas el la personeco de la Ĝenerala Direktoro, sed verdire ĝi estas parte struktura, parte la rezulto de manko de decida gvidado ĝenerale. La Komitato diligente (aŭ almenaŭ *iom* diligente) elektas sian estraron, sed ne donas al ĝi la rimedojn efike labori. Tiuj rimedoj estas unuavice *kunlaboro* kaj duavice financaj rimedoj por ebligi pli da kontakto inter estraranoj, ekzemple en periodaj estrarkunsidoj.

Vinko Ošlak aludas la “dogmon de neŭtraleco,” sugestante, ke tra la jaroj UEA troviĝis en “kompromisoj kun naziismo, faŝismo kaj komunismo”. Pli milde, Hèctor Alòs i Font avertas kontraŭ tro signifa ligiĝo al ŝtatoj. Similan vidpunkton alimaniere esprimas Jakvo Schram. Povus esti, ke la organizaj formoj nun ĉiam pli ofte vidataj en la socio kondukas nin for de tiu identiĝo kun ŝtatoj: landaj Esperanto-asocioj perdas sian organizan potencon kompare kun UEA, kaj la rolo de individuoj plifortiĝas, helpate ankaŭ de la reta kontakto, kiu ja ne rekonas landlimojn. Kvankam tra la jaroj multaj el la ideoj bataloj en kaj ĉirkaŭ UEA estas ŝajne kaŭzataj de malkonsento pri la difino de neŭtraleco, la esenca faktoro en tiuj bataloj estis ofte ne neŭtraleco en si mem, sed la unua adjektivo en la nomo de UEA: Universalaj. Celante la homojn de ĉiuj nacioj, UEA foje trovas sin, aŭ trovis sin, en situacio en kiu oni elektis kompromison por teni la universalcon. Lerta homo scias kiam kompromisi kaj kiam resti senkompromisa; la historio de UEA montras, ke la Asocio foje havis, foje malhavis, tiun lertecon.

La removiĝo de emfazo je landoj al emfazo je individuoj espereble kondukos al la desubismo, kiun Hèctor Alòs i Font deziras vidi en la Asocio: kulturoj kaj movadoj ne povas esti kreataj nur de iu elito, sed bezonas la engaĝiĝon de pli vastaj tavoloj. Vjaĉeslav Ivanov implice tion komprenas kiam li skribas, ke UEA “estas ĉie ĉirkaŭ ni”. Same Maria Sandelin, kiu pledas por demokratio kaj ankaŭ (kaj mi plene aplaŭdas ŝin...) “moderna kono pri komunikado”.

Samtempe, tamen, UEA devas esti preta preni sur sin tiujn taskojn, kiujn neniu aliaj povas fari — interalie efikan reprezentiĝon de Esperanto en mondaj kadroj (kiel Guojiang Wu atentigas). Tio ne implicas, kiel ŝajne sugestas Giorgio Silfer, ke neniu alia organizaĵo povas ludi rolon en difinita kampo; mi ripetas: UEA estu preta fari tion, kion aliaj organizaĵoj ne kapablas fari, ne simple paŭsi la laboron de aliaj (nek la aliaj simple paŭsu tiun de UEA). Unu afero estas klara: nek desubismo nek desuprismo sufiĉas: impulsoj devas veni de ambaŭ direktoj. Tiu kombino de fortoj estas malfacile atingebla kaj dependas (flanke ankaŭ de niaj gvidantoj) de subtila kaj simpatia kompreno de la diverseco de homoj kaj organizaĵoj, kiuj konsistigas nian dismetitan komunumon.

Humphrey Tonkin

Kaj Eŭropo kaj Esperanto vivas

Pasintsabate mi legis 14 gazetojn el 7 EU-landoj por ekkoni la reagojn al la irlandia referendumo. Nur la anglaj gazetoj, kaj aparte la dekstrismaj, ĝojis pri la rezulto. Hodiaŭ, la 18an de junio, Britio mem ratifis la Traktaton de Lisbono. Mi gratulas Brition kaj la aliajn 18 landojn, kiuj jam tute demokrate ratifis. Ĉar por mi, parlamenta voĉdonado, post longa kaj zorga studado, ja estas demokrate, kaj eble pli taŭgas ol voĉdonado de la tuta popolo kiam plimulto da ili konfesis ke ili ne komprenas la Traktaton.

Mi citu nur 4 etajn ekzemplojn:

1. Ratifiko de la Traktato de Lisbono signifus malpliigon de la nombro de EU-Komisionanoj ekde 2014. Sed la irlandia rifuzo ratifi signifas ke la Traktato de Nice daŭre validas, kaj tio decidis la malpliigon de la EU-Komisiono tuj kiam la 28a lando aliĝos al EU. Tio sufiĉe verŝajne estos dum 2009, kiam Kroatio aliĝos. Do, la irlandia referendumo decido fakte signifas, ke Irlando povus perdi sian membron de la Komisiono kvin jarojn pli frue. Kiom da irlandaj voĉdonantoj konsciis tion, kaj kiom da ili tiel voĉdonus, se ili komprenus tion?

2. Ratifiko de la Traktato de Lisbono signifus grandan pliigon de la tiel nomata “proceduro de kundecido”, t.e. ke kaj la Konsilio de Ministroj kaj la Eŭropa Parlamento devos ambaŭ konsenti por fari novan EU-leĝon aŭ regulon. Ĉiuj aferoj, kiuj trapasas tiun proceduron, devas esti tradukataj al la irlandia lingvo. Do, ratifiko de la Traktato de Lisbono rekte signifus grandan pliigon de la kvanto da materialo kiun EU produktas en la irlandia lingvo, kaj tiel pliigon de postenoj por irlandaj tradukistoj en la EU-institucioj. Ĉu iu pensas ke la irlandia popolo kontraŭus tion, se ili vere komprenus, pri kio temas?

3. Ratifiko de la Traktato de Lisbono signifus, ke ĉiu EU-leĝopropono, antaŭ la adapto devus esti sendita al ĉiuj naciaj parlamentoj de la 27 EU-landoj. Se triono de tiuj parlamentoj kontraŭus, la Komisiono devus repensi la proponon. Se duono de la parlamentoj havus zorgojn, la Konsilio de Ministroj kaj la Eŭropa Parlamento, kune, povus haltigi la leĝoproponon.

4. Ratifiko de la Traktato de Lisbono ebligus la tiel nomatan “inician de civitanoj”, t.e. unu miliono de civitanoj, el pluraj EU-landoj, rajtus fari rektan peton al la EU-Komisiono, kiu devus konsideri ĝin. Tiu mekanismo povus rekte helpi nin antaŭenigi Esperanton en EU.

Krome, oni povus malfacile diri, ke tiuj supremenciitaj ideoj ne estas demokrate. Sed la kontraŭantoj en Irlando

voĉdonis kontraŭ ĝi, kaj kontraŭ ĉiuj aliaj elementoj de la Traktato, ĉar “ili volis pli da demokratio”. Ĉu estas pli demokrate ke 26% de la voĉrajtigitoj de unu lando povas haltigi aferon kiun 19 aliaj landoj, kaj eĉ pli, volas fari? Ĉu estis demokrate en 2005, ke la voĉdonantoj en nur du landoj rajtis haltigi la Konstitucion, kiun jam ratifis la plimulto de EU-landoj, reprezentantaj la grandan plimulton de la popolo de EU?

Kompreneble mi iom simpligas, ĉar temas pri centoj da paĝoj de sufiĉe komplika teksto, teksto kiu nur komplikiĝis pro la rifuzo de la EU-Konstitucio far du landoj (strange kiel oni emas forgesi la pozitivajn referendumojn en Hispanio kaj Luksemburgio. Ĉu nur negativaj neistoj estas aŭskultindaj?). Mia persona opinio: bremsi Eŭropon nur plifortigas la usonan kaj anglalingvan dominadon. Hieraŭ la ĉeĥa prezidanto Václav Klaus esprimis sian personan opinion, ke “Eŭropo mortas, Esperanto mortas, nur la nacioj, kaj la naciaj lingvoj, vivas”. Mi havas alian opinion: kaj Eŭropo kaj Esperanto vivas, kaj en tiu vivanta Eŭropo, kie Esperanto daŭre plifortiĝas (vidu la unuan rezolucion de la Pollanda Parlamento la 12an de junio 2008), kaj la nacioj kaj iliaj lingvoj havas pli grandan okazon prosperi kaj flori.

Sean Ó Riain, Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio
PS. Temas nur pri mia persona opinio kiel irlandia civitano, ne temas pri oficiala sinteno de mia lando.

La irlandia neo: kiom signifa per si mem kaj por Esperantio?

La irlandia popolo decidis per referendumo ne ratifi la Traktaton de Lisbono, kiu estas la lasta ĝisdatigo de la konstitucia platformo de Eŭropa Unio. Malgraŭ alarmaj voĉoj de kristandemokratoj, socialdemokratoj kaj aliaj, spite al la vivuoj de naciistoj kaj klasbatalaj ruĝuloj, tiu nea baloto povas esti tute seninflua. Irlando fakte rifuzis ratifi ankaŭ la antaŭan traktaton (de Nico), sed kiam la ceteraj aliĝis tuj alvenis ankaŭ la subskribo de Dublino.

Nature restas solvendaj multaj problemoj survoje al la integriĝo de Eŭropo. La paraleleco de EU kaj NATO, kondukanta al la akcepto pri Turkio kaj al la rifuzo pri Ruslando, estas unu el ili, certgrade la ĉefa. Samtempe tiu problemo povas preventi estontan secesian militon, kiu ŝajnas fatala en la federismaj kunfandaj procezoj: tiel por Svislando kiel por Usono en la 19a jarcento. Ja estos pli malfacile sperti secesion, se ĉiuj aŭ preskaŭ dekomence situas en la sama armea alianco. Kaj estos pli malfacile sperti konflikton kun Usono, se la nordamerikaj ŝtatoj kaj la eŭropaj apudas en la sama armea alianco, kies ĉefa sidejo (vidu la hazardon) situas en Bruselo.

Por Esperantio la rimarkinda novaĵo estas, ke la politika partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE), kiu konkuros por la Eŭropa Parlamento en 2009, invitis voĉdoni kontraŭ la Traktato de Lisbono. Nun ni konas la pozicion tiurilate de tiu eta partio, iniciatita de Christian Garino en Francio kaj akceptita kiel kunlaboranta faka asocio en Universala Esperanto-Asocio (tamen triono de la Komitato en Florenco 2006 ne voĉdonis favore: preskaŭ sama proporcio kiel pri la Manifesto de Prago dek jarojn antaŭe). La pozicio de EDE kongruas kun la ruĝa minoritato en la Senato de la Esperanta Civito (grupestro Dieter Rooke), sed ne kun la vasta verda majoritato (grupestro Walter Želazny), kiu min kandidatigis kiel Konsulon. Ankaŭ ne kun la opinio de la dua minoritata opozicio, la blanka (grupestrino Nelly Holvevitch). Simple la granda plejmulto en la Esperanta Civito favoras al pli forta integriĝo de Eŭropo.

Giorgio Silfer, Konsulo de la Esperanta Civito

La lingva boato de EU ne multe remis kiam enestis nur dekduo: kaj kun la duoblo? (Bildo el *Heroldo de Esperanto*, 2008, №2)



Brazilo protestas

Aloísio Sartorato cirkulere dissendis al brazilaj esperantistoj la [recenzon](#) de Glebo Malcev pri la filmo *Gerda malaperis* (LOdE-159) kaj sian proteston pri ĝi (LOdE-164). Sekve de lia cirkulero ni ricevis sep pliajn protestajn reagojn, kiujn vi trovas ĉi-paĝe.

Mi prezentas mian varman proteston kontraŭ tiu malfeliĉa kaj agresema recenzo fare de s-ro Glebo Malcev. Mi opinias, ke ĉiu vera esperantisto havas la rajton analizi, eĉ kritiki laboron de iu ajn persono. Sed ekzistas konstruendaj kaj detruendaj kritikoj.

Ni esperantistoj devas rememori la pensmanieron kaj ekzemplojn de nia Majstro Zamenhof, kiu kelkfoje elmontris sian malkonsenton pri iu temo aŭ pri agmaniero de samideanoj aŭ de atakantoj al nia idealo. Li neniam silentis, sed kritikis aŭ respondis ĝentile, sen ofendo. Tian agmanieron oni ne rimarkas en la kritiko de s-ro Glebo Malcev. Antaŭ lia agresema kritiko, oni devas demandi: “ĉu vi estas esperantisto”? Se jes, kial vi ne klopodas kunkonstrui anstataŭ malkonstrui?

Aliflanke, mia mondcivitaneco ne permesas al mi rimarki liajn atakojn al brazilanoj...

José Passini

Mi skribas por komenti pri la recenzo de la filmo *Gerda Malaperis*, en la januara revuo *La Ondo de Esperanto*.

Mi scias, ke aliaj ankaŭ komentos pri, tio cirkulas tra listoj, tial mi preferas esti konciza. Simple mi konsideras tro rigora la analizon, kiu malkonsideris la amatorecon de la grupo, kiu faris la tutan laboron surbaze de preskaŭ ŝvitego propra, per troa peno, kaj la rezulto, kvankam ne komparebla al ordinara komercaj filmoj, ĝi plenumas sufiĉe la vakuon de nia nuntempa Esperanta filmproduktado. Ĝi estas fidela al la propono, utiliga al kursoj, kaj ĝuindaj por komencantoj. Ne aliajn similajn filmojn mi trovas en Esperantio, krom la bonega kurso *Pasporta Mondo*.

Rodrigo de Carvalho Mendonça

Mi bedaŭras legi mesaĝon senditan al mi pere de kelkaj geamikoj esperantistaj rilate al la recenzo farita de eminenta hollywooda filmkritikanto, s-ro Maldec, en tiu grava kaj respektinda revuo.

Kion celas li? Insulti brazilanojn? Aŭ li faris tion ĉar li trovis pli bonan filmon originale faritan en esperanto kaj ne recenzis ĝin ankoraŭ? Aŭ li simple volas moki nian karan Piron?

Certe nia laboro ne estas hollywooda, eĉ ne sufiĉe bona por kelkaj kritikantoj, sed estas honeste kaj bonvole farita ĉi tie en la tria mondo, helpe de diversaj gesamideanoj el la tuta mondo, kiuj fidis je nia sincera laboro kaj volo progresigi la esperantan movadon. Niajn rimedojn ni uzis laŭ niaj ebloj, kaj ne estis en unusola fojo kiun ni ĝin filmis... estas laboro farita dum preskaŭ unu jaro, kun la roluloj veninte el diversaj partoj de Brazilo, donacinte siajn tempon, monon kaj energion por provi realigi la revon de centoj da esperantistoj tutmonde. Krome, ni pruvis ke kun iom da bonvolemo ni povas fari plej bonan laboron helpe al disvastiĝo de esperanto.

Nia “aĉa filmo” atingis 97 landojn kaj el tiuj 97 landoj venis nur unu atako, ĝuste tiun faritan “senpage” de via fama recenzulo. Tio pruvas ke la tuta esperantistaro estas stulta, ĉar ĝi apogis tiun stultan projekton kaj ankaŭ aĉetis pli ol du mil ekzemplerojn. Do, nome de la brazilanoj kaj ĉefe de la cetera esperantistaro tra la mondo, ni pardonpetas pro la malbonkvalita filmo *Gerda Malaperis* kaj atendas senpacience la lanĉon de pli bona por fariĝi vidpunkto por ĉiuj kiuj volos eniri la vojon de glora laboro fari belajn filmojn kiuj meritos la laŭdon de s-ro Maldec.

Joe Bazilio

La plej venenajn malamikojn Esperantujo rikoltas interne de la movado. La listo de tiaj malamikoj feliĉe estas malgranda, kaj oni povas al ĝi aldoni la nomon de S-ro Glebo Malcev, se ne temas pri intence kaŝiga pseŭdonimo. Fakte ne ĝenas min komentoj devenaj de homoj tiaj. Priokupas min la fakto ke L.O.E akceptis publikigi tekston neniom konstruan.

Sendube ke ĉiuj faras (aŭ devas fari) sian plejbonon favore al Esperanto. Oni povas kritiki, sugesti, plibonigi la faritaĵojn, sed neniam instigi al neaĉeto. Estus pli signifohave se S-ro Glebo anstataŭ detrukritiki estus farinta plibonkvalitajn filmojn. Sed li eĉ ne scipovas Esperanton!.. Lia teksto ja estas multege fuŝa, kaj mi sammezurile kritikis lian tekston, emfazante kelkajn vortojn aŭ esprimojn kaj respondante ilin. Se oni ne apogas iniciaton favoran al Esperanto, oni almenaŭ silentu, male oni estus simple perfidulo kiu kaŝite kaj subite atakas laboremajn neniongajnajn samideanojn.

Mi ĉeestis prezentadon de la filmo dum Kongreso, kaj tuj aĉetis ĝin, samkiel aĉetis multaj aliaj. Tio signifas, ke por mi ĝi estas bonega.

Mi apogas la protestan retmesaĝon de S-ano Aloísio Sartorato.

Celio Freitas Martins

Glebo Malcev, uzante malbonajn vortojn, diris malbonajn aferojn pri la filmo... Bedaŭrinde! Troege bedaŭrinde!

Ni devas klarigi al la respektinda S-ro Glebo Malcev ke nenia afero naskiĝas perfekta... Li mem, nune klera homo, kiel ni ĉiuj naskiĝis kun malperfektaĵoj, kiuj estis poste eliminitaj de tiuj kiuj edukis lin... kaj de li mem, klopodante je perfektigi...

Tia estas la filmo *Gerda Malaperis*: seriozaj kaj amemaj E-uloj — esperantaj uloj, mi diris — faris filmon por instigi aliajn fari la samon, kaj tio, kompreneble, okazigonte multfoje, estonte, finfinos en E-perfektaĵoj, ĝuste tiel kiel deziras nia klera S-ro Glebo Malcev.

Kara amiko, samideano Glebo Malcev: estu samideano!

Teknike bonaj aferoj estas dezirendaj kaj dezirindaj, sed tio ne implicas detruo la unuajn klopodojn de tiuj kiuj klopodas!

Saulo Salgado Wanderley

Kun granda malĝojo kaj forta ŝoko mi legis la kritikaĉon de iu S-ro Malcev kontraŭ la DVD *Gerda Malaperis*. Mia malĝojo kaj ŝoko estas surbaze de tiu agresema kritiko. Kritikoj ĉiam bonvenas, kiam ili venas akompanataj de dozo de respekto. Tiu sinjoro ne nur malrespektis la laboron faritan de aliaj samideanoj, inkluzive laboron de unu el nia elstara verkisto (Claude Piron). La filmo, de la komenco ĝis la fino, laŭvorte sekvis la lernolibron *Gerda Malaperis*. Ĉu tiu sinjoro estus kapabla fari pli bonan laboron? Do faru! Se ne, ne estu tiel severa rilate al la laboro de aliuloj!

Kaj ne forgesu: ju pli da severeco en la tono, des pli da malagordo en la pravigo.


Lúcia Marder

Solidare al Joe Bazilio, brazilana reĝisoro de la didaktika filmo *Gerda*, mi ne povas rezigni pri la bedaŭrinda maniero recenzi de Glebo Malcev. Akra kaj facilamima vortumado ne helpas plibonigi ies ŝvititan laboraĵon. Sciu tiu fibuŝa kunlaboranto de *La Ondo de Esperanto*, ke ne estas kohera kritiko prijuĝi verkon laŭ postuloj, pri kiuj eĉ ne imagis la aŭtoro.

Se li volas koni profesion brazilan kinoarton, li provu spekti la plej novan verkon de Fernando Meireles, *Blindecon*, bazitan sur la romano *Eseo pri blindeco* de la nobelpremiita José Saramago. *Gerda* kaj *Blindeco* malsimilas ne nur laŭ la buĝeta kriterio, sed ankaŭ laŭ la celo proponita. Por la signifo de celo sufiĉas diri, ke *Gerda* parolas la esperantan, sed la profesia *Blindeco* nek la portugalan, nek la ukrainan, sed la anglan.

Jozefo Lejte

Ĉu mi vomu sange*?!



Ege kortuŝis min amaso da emociaj reeĥoj el la lando de sovaĝaj simioj* (ial mi dubas pri sama aktiveco de brazilanoj, se *Gerda malaperis* aperus, ekzemple, en Ruslando aŭ Japanio) — koran dankon!!

Mi havas neniun vorton por aldoni al la recenzo, nek argumenti pri kompetento de la redakcio — ne cara afero*. S-ano Bazilio pruvis, ke en Brazilo ekzistas io, krom spiritismo, sed...

Karaj, diru honeste: ĉu vi kredas, ke protestoj povas plibonigi la filmon? Ĉu vi kapablus spekti similan amatoraĵon portugallingvan dum pli ol minuto, aŭ vin simple gvidas ofendo al eŭropaj snoboj?!

Recenzisto celas prezenti, analizi kaj signali pri avantaĝoj kaj eraroj, do endas dankeme akcepti ajnan profesinivelan kritikon, ĉar ĝi helpas altigi kvaliton de nia komuna kulturo.

Glebo Malcev

* Eble utilas mencii, ke la asteriskitaj esprimoj estas prenitaj el art-verkoj. (*La red.*)

Faktoj sen komentoj

Ruslando: ĉampiono de Eŭropo. Pri kio?

Dum januaro-majo la manĝaĵ-prezroj en Ruslando kreskis je 11,6%. Tio estas la plej granda kresko en Eŭropo. En EU la manĝaĵ-prezroj kreskis averaĝe je 3,1%. Inter la landoj de EU dum la sama periodo la manĝaĵoj plej multekostiĝis en Finnlando (8,2%), Latvio (8,1%) kaj Litovio (7,6%). La plej malgranda prezokreskado estis en Malto (nur 1,5%).

Sep mirakloj de Ruslando

10 jun estis anoncitaj la Sep Mirakloj de Ruslando, elektitaj per amasa tri-ŝtupa voĉdonado, en kiu estis donitaj, entute, pli ol 25 milionoj da voĉoj.

Ĉi tiuj mirakloj estas: monto Elbruso, Gejsera Valo en Kamĉatko, lago Bajkalo, eroziaj rok-idoloj sur la monto Manj-pupu-njor en Norda Uralo, Peterhof apud Peterburgo, monumento Patrino-Patrujo en Volgogrado kaj katedralo de Bazilo la Beata en Moskvo.

Kion britoj ŝatas legi

Ne 25 milionojn, sed nur 2 mil voĉojn ricevis la brita retvendejo Play.com por decidi, kiujn romanojn oni plej ŝatas en Britio. Laŭ ĉi tiu enketado, la plej bona romano de ĉiuj epokoj kaj popoloj estas *Mortigi la mokbirdon* de usona verkistino Harper Lee. La duan lokon okupis *La Mastro de l' Ringoj* de J.R.R. Tolkien, kaj en la tria loko estas libro de oksforda amiko de Tolkien, Clive Staples Lewis, *Leono, sorĉistino kaj vestoŝranko* el la serio *Kronikoj de Narnio*.

En la listo estas nur du rusaj romanoj: la 16a estas *Milito kaj paco* (pli ĝuste: *Milito kaj mondumo*) kaj la 23a — *Anna Karenina*, ambaŭ de Lev Tolstoj.

Ĉu Corsetti aŭ Korseti?

Estas, laŭ mi, tre amuze, konstati, ke ĝuste tiuj esperantistoj, kiuj asertas, ke:

— Esperanto estas lingvo kiel ĉiuj aliaj;

— ĝi evoluas nature kiel aliaj lingvoj kaj prefere rapidu akiri kelkajn malregulaĵojn (ĉu ni volas lasi la monopolon de malreguleco al la angla kaj al la franca?);

— la literatura lingvo estu tia, ke normalaj legantoj sciu, ke literaturistoj parolas nekompreneble ĉar ili estas inteligentaj;

ankaŭ ĝismorte defendas la superecon de la angla sistemo, ne transskribi personajn kaj geografiajn nomojn. Kelkaj el ili ankaŭ konfesas, ke Esperanto estas pli skriba ol parola lingvo, sed baze ili ne volas ke Esperanto havu aspekton malsimilan je tiu de la “grandaj” latin-alfabetaj lingvoj.

Tamen Esperanto estas ankaŭ parolata lingvo kaj legantoj rajtas scii, kiel elparoli la nomon de nia granda novradikisto kaj brila poem-tradukisto Kalocsay. Tra la jardekoj mi aŭdis ĉiun eblan elparolon: Kaloksaj, Koloĉaj, Kaloĉaj, ktp.

Ĝuste pro tio ekestis la projekteto *Konsiloj por transskribado* (http://www.bonalingvo.it/index.php/Konsiloj_por_transskribado). Temas pri redaktado de tabeloj kun konsiloj kiel transskribi **nur** per la alfabeto de Esperanto kaj laŭeble plej proksime al la originalo la sonojn kaj literojn de unuopaj lingvoj. Nun estas en ĝi konsiloj rilate al la lingvoj: araba, germana, hebrea, hispana, itala, nederlanda, portugala, rusa, svahila kaj ukraina.

Vidu malgrandan ekzemplon pri la sonoj de la litero “g” en la itala, por havi ideon pri tiuj tabeloj:

ga, go, gu = **ga, go, gu** [Garfagnana = Garfanjana]

ghi, ghe = **gi, ge** [Ghisolfa = Gizolfa]

gia, gio, giu = **ĝa, ĝo, ĝu** [Giuseppe = Ĝusepe]

gi, ge = **ĝi, ĝe** [Giovanni = Ĝovani]

gl = **lj** [Giglio = Ĝiljo]

gn = **nj** [Cologno = Kolonjo]

La kontribuoj rilate al la malsamaj lingvoj estas ankaŭ inter si malsamaj, ĉar kelkaj donas pli grandan gravecon al la skrib-signoj de la originala lingvo kaj kelkaj al la elparolo. Temas pri nova kampo, kaj ĉies kontribuo estas bonvena. Por diskuti, skribu al la listo: klasika-esperanto@googlegroups.com.

Renato Corsetti

MEF daŭre restas en la Pakto

Reference al glosa pri Meksika Esperanto-Federacio, en la numero 6 de LODE, la Konsulo de la Esperanta Civito informas, ke ĝis nun la MEF faris neniun komunikon pri sia statuso en la Pakto. Sekve, eĉ se neniun volas reteni iun ajn, la statuso de MEF daŭre estas tiu de la paktinto. Por eliri, same kiel por eniri, necesas liveri la protokolon de la koncerna asembleo.

Giorgio Silfer

Opinio el Germanio

En Germanio aperas ĉiun ĵaŭdon la plej legata semajnavuo *Stern* (Stelo). En ĉiu eldono disponas pri unu paĝo la akre kritikanta ĵurnalisto Hans-Ulrich Jörges. 15 maj aperis lia ege interesa artikolo *Die Rückkehr Königsbergs* (La reveno de Königsberg). Supozante, ke vi konas en via urbo germanlingvajn parolantojn, mi varme rekomendas, ke ili traduku por vi la artikolon.

Bertil Englund

Ĉu estis Moskvo aŭ Londono?

de Ian Fantom

Zamenhofa tago pasint-jare markis la dudekan datrevenon de la morto de Ivo Lapenna, kaj ankaŭ, preskaŭ precize, trionjarcenton de post lia drameca ekŝigo kiel Prezidanto de UEA. Li plendis pri nigriga kampanjo kontraŭ lin, kaj fine, en artikolo en la revuo *Esperanto*, ke la fonto de tiu kampanjo estis Moskvo, cele al transpreno de la asocio kiel fronta organizaĵo. Tuj la vortoj ĉirkaŭiris: “Lapenna estas paranoja”; kaj tiel restis dum triona jarcento.

Mi mem estis inter tiuj, kiuj opiniis, ke Lapenna tro reagis, sed tro reagis al kio? Liaj reagoj estis laŭ mi kongruaj kun liaj personeco kaj deveno: kroato loĝanta en Londono. Tute kontrastan, kaj tipe britan, aliron prenis alia esperantisto en Londono, la ĉefministro Harold Wilson. Li estis esperantisto en tio, ke li parolis subtene al Esperanto, lerninte la lingvon kiel skolto. Plurajn jarojn post sia ekŝigo kiel ĉefministro li aliĝis al la Esperanta Parlamenta Grupo. Mistifiko tamen estis al ni lia silento pri Esperanto dum lia ĉefministra periodo.

Ankaŭ Wilson plendis pri subfosaj trukoj kaj nigriga kampanjo, sed pri tio la publiko nenion sciis. Li mem atribuis la kampanjon al la sekurecservo MI5. Publike li deklaris: “Se miaj kontraŭuloj ĉesos diri pri mi malverojn, mi ĉesos diri pri ili la veron”. Tamen la vortoj ĉirkaŭiris, ke Wilson estas paranoja, kaj tiel restis dum tridek jaroj.

MI5, aŭ “Milita Inteligentoservo, branĉo 5”, kiel oni tion nomas en Britio, estas la enlanda sekurecservo. La eksterlanda ekvivalento, MI6, fariĝis fifama en 2003 pro la falsado de armiloj de amasa detruo en Irako, kio donis pretekston al Britio kaj Usono ekmiliti



Harold Wilson (1916–1995), unu el la multaj okcidentaj politikistoj (ĉefministro de Britio, 1964–1970, 1974–1976), kiu sciis kaj subtenis Esperanton, estis misfamigita de MI5 kiel sovetunia spiono.

kontraŭ la landon. Pri aliaj branĉoj en la serio, se ili ekzistas, la publiko scias nenion. Ili estas parto de la militservoj, kiuj estas lojalaj al la monarĥio, malkiel la polico, kiu estas civitana, kaj respondecas fine al la parlamento.

En la jaro 2006 eliris en la brita televido programero *La Komploto Wilson* [1]. Post sia ekŝigo, Wilson petis al du ĵurnalistoj priesplori la trukojn, kaj ili kaŝe sonbendis la intervjuojn kun Wilson [2]. Du jarojn poste ili publikigis libron pri la afero [3], sed nur tridek jarojn poste estis publikigitaj novaj informoj el la registaraj arĥivoj. La televida programero enhavis multajn intervjuojn kun la esplorintoj, kaj kun rol-

antoj en la epizodo. Ja estis la vero, ke MI5 provis lin “fiksi”, laŭ la vortoj de emerita vicestro de MI5, kaj estis raportite, ke la estro de MI5 mem paronpetis al Wilson pri la afero.

Do kio povus esti malantaŭ tiu afero? Estis raportite, ke la kontaktulo ĉe MI5 de la usona CIA, James Jesus Angleton, disvastigis la famon, ke Wilson estas sovetia spiono. Wilson tro ofte vizitis Moskvon, li argumentis, kaj lia antaŭulo kiel gvidanto de la Laborpartio, Hugh Gaitskill, mortis subite post vizito de Moskvo, kie li trinkis tason da teo. Ŝajne neniu plu kredas la rakonton, kaj ne estas klare ĉu Angleton mem kredis. Angleton aktivis en CIA en la tempo de makartiismo, en kiu multaj estis persekutitaj pro supozataj komunismaj tendencoj.

La kialo de la subfosa kampanjo pli verŝajne rilatis al iu potencbatalo: Wilson deklaris ke li tutsimple ne povis regi la landon kiel ĉefministro. Alivorte, la potenco restis ĉe la “viroj en grizaj kompletoj”, kiel la ŝtatservistoj en Whitehall nomas la misterajn homojn kiuj ŝajne influas aferojn. Esperanto povus esti ne kaŭzo de la subfosado, sed eble unu indiko pri la sendependa menso de la ĉefministro.

Iom pli poste ekŝigis subite tria altprofilaj esperantisto. Temis pri la prezidanto de la Esperanta Parlamenta Grupo, lordo Davies de Leek. La Esperanta Parlamenta Grupo estis starigita en 1972; mi akceptis tiujare respondecon en Brita Esperanto-Asocio pri Gazetaraj kaj Publikaj Rilatoj, kaj tuj mi starigis laborgrupon por pritrakti diversajn aspektojn de publika informado. Pri unu agadsfero mi tamen ne havis spertojn, kaj pro tio demandis al amikoj, ĉu iu havas ideojn kiel aliri parlamentanojn. Post nelonge mia estonta edzino Heleno diris, ke per stranga koincido aperis en La Londona Esperanto-Klubo iu, kiu havas ideojn, kaj ke li jam gvidis parlamentan agadon por la britaj humanistoj. “Do, ni parolu”, mi — diris.

Kune, ni starigis agadon sub la nomo *Esperanto Lobby* [Esperanta influagado], kaj organizis la skribadon al parlamentaj kandidatoj fare de la



Multaj strangaj eventoj, kiuj dum jardekoj ŝajnis nekompreneblaj, aŭ estis facilanime atribuataj al Moskvo, estis zorge planitaj en la “Centra Oficejo” de MI5 en Londono.

britaj esperantistoj. La rezulto estis spektakle sukcesa. Post la nacia balotado en februaro 1974 ni eĉ gajnis pli da parlamentanoj por la Esperanta Parlamenta Grupo ol havis la ĵusvenkinta Harold Wilson en sia propra partio. Esperanto gajnis pere de tio relative altan kaj pozitivan profilon en la brita gazetaro dum jardekoj. Tamen, ekokazis intervenoj.

La kunordiganto de la Parlamenta Grupo, Ron Coverson, vokis kvar el ni al speciala kunveno. Alvenis la prezidanto kaj vicprezidanto de BEA, la kunordiganto de Sindikata kaj Kooperativa Esperanto-Grupo, kiu esence konsistis el maldekstraj membroj de la parlamenta grupo, kaj mi mem. Sen diri ion, Coverson enŝaltis magnetofonon, kaj ni aŭskultis iom longan konversacion inter Coverson kaj lordo Davies. La konversacio komenciĝis sufiĉe malstreĉe, kun la kutimaj salutvortoj, sed iom post iom evidentiĝis, ke estas io funde malĝusta. Lordo Davies rakontis, kiel li eniris la parlamentejon, kaj salutis, kiel kutime siajn kolegojn, sed iuj el ili gratulis lin pro letero en la nacia gazeto *The Guardian*. Li ĝentile dankis, sed tuj iris al la biblioteko, por eltrovi pri kio temas. Ja estis tre kredebla letero en la gazeto pri la Esperanta Parlamenta Grupo sub lia nomo. Li mem tamen ne verkis ĝin.

Ankaŭ pri aliaj strangajoj li raportis, kiel ekzemple pri paro kiu aranĝis rendevuon kun li, ŝajne nur por pasigi la tempon de la tago. Mi akceptis la respondecon priesplori la gazetleteron, sed laŭ peto de Coverson, ni ĉiuj promesis teni la aferon sekreta, por ne embarasi lordon Davies. Mia konkludo estis, ke la truko estis de profesia nivelo, kaj ke ja estis ia kaŝa observado. La plej lasta nombro de parlamentanoj en la grupo estis ĵus kalkulita de Coverson mem. La informo ne estis sekreta, sed ni tutsimple ankoraŭ ne havis la okazon mem pritrakti kaj pluisendi tiun informon. Mi mem eĉ ne estis leginta en tiu momento la memorandon. Tamen la ĝusta nombro aperis en la publikigita letero. Mi intervjuis ĉiujn, escepte de Coverson mem, kiu estis ekster suspekto; kial, mi pensis, oni tiom bone kunlaboru por starigi ion, nur por poste fortiri la tapiŝon de sub la piedoj de la homoj. La afero ne havus sencon.

Tamen iom pli poste, Coverson komencis diri private, “Esperanto estas freneza ideo, ĉu ne?” Mi tutsimple respondis, ke ne, sed mi scivolis, kial li dediĉas tiom da tempo kaj energio al la afero. La sola klarigo, kiun mi povis

pripensi estis, ke li volas fariĝi konata inter parlamentanoj. Tamen tio ne klarigus lian deziron eniri la Estraron de la asocio. Li komprenis Esperanton, sed malbone parolis la lingvon, kaj ne montris grandan emon plispertiĝi.

Post iom da tempo mi eksciis, ke li registris la nomon *Esperanto Lobby* kiel komercan nomon por si mem, tiel efektive eltirante la agadon ekster la asocion. Mi plendis pri tio en la Konsilantaro de BEA, kaj eltrovis, ke la dungita kompania sekretario mem subskribis la ĉekon. Mi insistis pri klarigo. Coverson prenis tiun momenton por anonci la kialon de la ekŝigo de lordo Davies, kaj tuj ekestis eksplodo de kolero inter iuj en la Konsilantaro. La registriĝo de *Esperanto Lobby* kiel komerca nomo estis forgesita. Iom pli poste mi eliris la Estraron kaj Konsilantaron de la asocio, surbaze de tio, ke mi ne povus bone plenumi mian rolon en tia politika etoso. Mi ne opiniis ke neesperantisto estu en la Estraro, kaj dum miaj sinceraj kolegoj opiniis min tro sentema, mi opiniis ilin naivaj.

Tamen la ideo ke la kaŝa observado en la afero Davies povus esti interveno de ŝtataj instancoj estus al mi tiutempe eĉ ne pensebla. Pri MI5 mi sciis preskaŭ nenion. Ĉi tiu sekretservo estis afero de la generacio de miaj gepatroj; ekde kiam mi naskiĝis ne estis ia granda milito. La naziismo estis venkita en 1945, kaj nun ni vivas en libera demokratio. Niaj sekretservoj ne farus tiajn aferojn inter civitanoj. La granda minaco en la socio venis de la “malamiko interne”, kiel oni nomis la sovetiajn enfiltrintojn, kiuj transprenis la maldekstrajn sindikatojn kaj politikajn partiojn. Nur dum la lastaj du jaroj mi eltrovis, ke plejparte tio estis malvero. La sovetia minaco de la “malamiko interne” estis grandskale troigita ĝuste de MI5 [4,5].

Pri la Komunista Partio de Granda Britio, KGB estis singarda, ĉar ties agentoj sciis, ke ĝi estis forte penetrita de MI5 [4]. En la naŭdekaj jaroj la partio estis preskaŭ komplete en la manoj de MI5; la agentoj de MI5 sciis pli, pri tio kio okazas, ol la komunistoj mem.

La supozo de Ivo Lapenna en 1974, ke la nigriga kampanjo venas de Moskvo, fontis el letero kiu venis en liajn manojn de s-ro Ŝvistak, en kiu li ŝajne donas instrukciojn al ĉeĥoslovakaj delegitoj voĉdoni por aliaj kandidatoj por la Estraro de UEA ol Lapenna. En tiu situacio, estus tre kredeble, ke Moskvo ne deziras, ke Lapenna restu prezidanto de UEA. Aliflanke, el orient-



Annie Machon kaj David Shayler forlasis la servon de MI5, kaj malkaŝis, interalie, pri kontraŭleĝaj intervenoj en la Komunista Partio de Britio.

eŭropa vidpunkto, estus tute normale ke delegitoj ricevu instrukciojn pri voĉdonado, kaj la ellaso de la nomo Lapenna ne nepre signifus ke ili estus parto de granda komploto.

Tamen de kie vere venis la influo en la komunistaj landoj por voĉdoni kontraŭ Lapenna? Komunista aktivulo kaj esperantisto en Londono, Bill Keable, diris al mi en 1974: “Se estus komunista komploto, mi sciis pri ĝi”. Kiam mi diris tion al mia edzino, ŝi diris: “Sed Ian, eble li ja scias pri ĝi”. Mi miris, ke mi ne vidis tian evidentajon, tamen mia propra penso estis, “Vi, amiko, sciis nenion pri ĝi!” Mi havas nenian kaŭzon pridubi la sincerecon de Bill Keable, sed mia nuna informo estas, ke li kontraŭis Lapenna, pro tio ke li opiniis lin kontraŭkomunisma, surbaze de profesia artikolo en la angla lingvo. Ĉu tiu ideo estis origine lia propra ideo, aŭ ĉu iu en la Komunista Partio (aŭ MI5) tion sugestis al li, mi ne scias. Tamen mia informo estas, ke tiel li argumentis al la reprezentantoj de la komunistaj partioj. Ŝajne la vojo al Moskvo, kiun eltrovis Lapenna, atingis Pragon, kaj abrupte turniĝis en la direkton de Londono.

Falsi aferojn prepare al subfosa truko estas relative facile farebla; tamen falsi aferojn por retrospektive kaŝi la trukon dum jardekoj certe estus alia afero. Post la evento, oni povas rigardi, kio fakte rezultis el la truko, kaj demandi sin: ĉu eble tiu rezulto povus esti la vera celo? En la Universala Kongreso en 1971 okazis debato inter Ivo Lapenna, por UEA, kaj reprezentanto de Brita Konsilio, MacMillan, kun samtempa interpretado inter la angla kaj Esperanto. La prelego de MacMillan komence

estis sufiĉe facile komprenebla, sed daŭre la lingvaĵo fariĝis pli kaj pli ob-skura, tiel ke fine eĉ mi, kiel anglalingvano, ne povis sekvi ĝin. Mi supozis, ke lia celo estus demonstri la superecon de la angla lingvo. Tamen ŝajnis ke li sukcesis demonstri nur la malon. La fina rezulto estis, ke la interpretado kolapsis, kaj ke transprenis John Wells, lingvisto, kaj prezidanto de LKK. Lia interpretado estis nekredible fulmrapida. Por klarigi en liaj vortoj: “Meze en la anglalingva parolado de MacMillan, la alia interpretisto komencis lami, kaj baldaŭ devis tute rezigni pri sia tasko. Mi ensaltis por savi la situacion, restarigante fluan kaj efikan interpretadon, je granda aplaŭdo de la publiko. La postan tagon okazis la elektoj por la Estraro de UEA, kaj supozeble mia sukceso en tiuj elektoj ŝuldis ion al tiu interpreta spektaklo”. [6]

Dum la tuta Afero Lapenna, mi provis kompreni la vervon de la verkanto de provokaj artikoloj en *La Brita Esperantisto*, Dermot Quirke. La cetero de liaj paĝoj, *Aliflanke*, ŝajnis al mi, kiel junulo, bonega satiro, sed estis kvazaŭ li havas mision faliĝi Lapenna. Jarojn poste li agnoskis, ke li ja intence provis provoki Lapenna [7]. Aldone, mi scivolis de kie li havigas siajn informojn pri la diktatoreco de Lapenna. Supozeble temus pri diktatoreco en la Estraro de UEA, sed neniam venis konkreta ekzemplo. Ĉu Quirke inventas la aferon, mi scivolis. Ĉu eble li havas amikon en la Estraro? Nur nun mi scias ke li ja havis amikon en la Estraro, kvankam tio en si mem nenion pruvas.

Kvankam Lapenna havis fortan karakteron, li ĉiam ŝajnis al mi demokrata en sia aliro. Li kontraŭis la ideon de Universala Kongreso en Londono por 1971, ĉar tiu estis elektojaro, kaj li ne deziris havi furoron sur la hejma teritorio. Tamen ĝi okazis. Ŝajnis al mi strange, ke la Londona Klubo insistis ĝuste pri tiu jaro kontraŭ la volo de la Prezidanto de UEA. Poste, ŝajnis al mi strange ke por la UK en 1973 oni elektis ĝuste la landon en kiu ne povis partopreni la Prezidanto de UEA, se tio fakte estis la vero. Lapenna diris al mi, ke li rajtas viziti Jugoslavion kiel privata civitano, sed ke li petis al Marinko Ĝivoje fari kelkajn diskretajn esplorojn pri la situacio se li venos kiel prezidanto de UEA. Poste li diris al mi, ke Ĝivoje reraportis, ke prefere li ne iru, do li ne iros. Eĉ tiutempe mi estis perpleksigita; ĝuste de kie venis tiu mesaĝo?

Denove, en la vortoj de John Wells:



Ĉu Ivo Lapenna ĝuste sciis, kiuj iniciatis la kampanjon kontraŭ lin?

“En 1973 la UK okazis en Beograd. Prof-o Lapenna, estante politika rifuĝinto kiu fuĝis la reĝimon de Tito, ne povis persone partopreni la kongreson. Nia estrara kunsido okazis sen la prezidanto. Ni perceptis klare la senton de la komitato de UEA, kiu ne plu volis akcepti la konduton de la prezidanto. Private ni avertis lin, ke kun tia konduto li riskas ne reelektiĝi en la venontjara UK, Hamburgo. Nia averto trafis surdajn orelojn”. [6]

Mi nun konas plurajn homojn kiuj suferis iom similajn situaciojn, kaj ŝajne estas tute normale insisti paroli pri la afero, dum aliaj ne volas aŭdi. La plendoj kontraŭ Lapenna daŭre ŝanĝiĝis: en la kvindekaj jaroj estis ke li estas komunisto; en la UK de 1971 temis pri skandalo en la Centra Oficejo de UEA, neantaŭvidebla eĉ jaron pli frue; poste estis lia diktatoreco, kaj fine lia konduto, en tio ke li volis diskutigi la aferon. Post lia eksiĝo la plendo estis, ke li estas paranoja. Tio, laŭ mi, ja estas signo de nigriĝa kampanjo.

Konklude, tiu ĉi studo havos utilon, se evidentiĝos estontece simila situacio en la movado; tiel ni povos pli facile rekoni la simptomojn. Se temus pri transpreno de organizaĵo por uzo kiel fronta organizaĵo, oni farus kviete, kaj por tuja uzo. Se tamen oni volas penetri organizaĵon cele al malmuntado, oni pensus ne pri jaroj, sed pri jardekoj. Tiel estis en la Komunista Partio de Granda Britio, kiu ankoraŭ en la naŭdekaj jaroj enhavis kvardek agentojn de MI5 [4,5]. La ĉefa

tasko por agento estas gajni kredindecon, ofte dum multaj jaroj, en kiuj oni ŝajne pozitive partoprenas en la agado. Oni eble prenas la iniciaton en aferoj kiuj okazus ĉiukaze, kaj ĉiuj estas dankemaj. Nur poste oni fortiras la tapiŝon de sub la piedoj de la homoj. Intertempe, oni povas provoki kvereladon inter bonfidaj membroj. Oni raportis pri penetrado de MI5 en eĉ etaj organizaĵoj kiuj prezentas nenian minacon al nacia sekureco. Ĉu tio povus inkluzivi Esperanto-asociojn?

Transpreni la komunistan partion estis, oni raportis, facile, ĉar la komunistoj ne estis konsciaj pri sekureco. Ankaŭ facile inter la komunistoj estis provoki kverelojn.

Ĉu ni en la Esperanto-movado estas konsciaj pri sekureco? Certe ne — almenaŭ ne en okcidenta Eŭropo. Nia Esperanto-movado estas nekredible malferma kaj akceptema al iu ajn, eĉ ĝis la grado ke oni akceptas en Esperanto-komitatojn homojn, kiuj deklaras sin neesperantistoj. Transpreni kaj malmunti la Esperanto-movadon certe estus facilege por iu ajn duonkompetenta grupo de dudeko da homoj kiuj tutsimple volas antaŭenigi siajn karierojn, senkonsidere de la sociaj sekvoj.

Referencoj

1. *The Plot Against Harold Wilson* [La komploto kontraŭ Harold Wilson], BBC-televido, BBC2, 2006-03-16 21:00.
2. *Wilson “plot”: The secret tapes* [La komploto Wilson: la sekretaj sonbendoj], Brian Wheeler, news.bbc.co.uk, 2006-04-09.
3. Barrie Penrose kaj Roger Courtiour. *The Pencourt files* [La dosieroj Pencourt]. Harper & Row, 1978.
4. Mark Hollingworth kaj Nick Fielding. *Defending the Realm: Inside MI5 and The War on Terrorism* [Defende al la regno: ene de MI5 kaj la Milito kontraŭ Terorismo]. Andre Deutsch Ltd, 2003 (paperbindita, tria reviziita eldono).
5. Annie Machon. *Spies, Lies and Whistleblowers: MI5 and the David Shayler Affair* [Spionoj, mensogoj kaj malmaskantoj: MI5 kaj la afero David Shayler]. The Book Guild Ltd, 2005.
6. John Wells. *Personaj rememoroj pri Ivo Lapenna* // Eseoj Memore al Ivo Lapenna. www.kehlet.com, 2001, pĝ. 306–309.
7. *Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970–1980*. Kalkthout, 2002.

Poemoj de Vasilij Ĵukovskij

Vasilij Andréjeviĉ Ĵukóvskij (1783–1852), ekstergeedza filo de bienulo Afanasij Bunin kaj ties turka servistino Sajĥa, estis fariĝonta servutulo. Tamen lin adoptis seninfana nobelo Andrej Ĵukovskij, kaj do Vasilij nobeliĝis kaj ricevis bonan edukadon.

Li ekverkis jam en la 8-jara aĝo, kaj en 1797 estis publikigita lia poemo *Maja mateno*. Unu el la fondintoj kaj kolonoj de la rusa romantikismo, li verkis kaj tradukis poemojn, baladojn kaj fabelojn, redaktis *Heroldon de Eŭropo*, recenzis kaj kritikis. La unua strofo de lia *Gardu la Caron Di'* (muziko de princo Aleksej Ljvov) dum 1833–1917 estis la ŝtata himno de Ruslando.

Baldaŭ post la milito kontraŭ Napoleono, Ĵukovskij ekservis kiel instruisto ĉe la Imperiestra familio, kaj ekde 1826 kiel “mentoro” de la heredanto, posta Imperiestro Aleksandro II. En 1841 li demisiis kaj iris al Germanio, kie li geedziĝis kun 19-jara Elizabeth Reiter. Li forpasis en 1852 en Baden-Baden kaj estis entombigita en Peterburgo.

Lia plej konata verko, *Svetlana* (1812), estas adapto de la balado *Lenore* (1773) de Gottfried August Bürger (1747–1794). Ĝia Esperanta traduko (de Klara Ilutoviĉ) aperis en *La Ondo*, 2005, №12.



AIKo

VENKANTO

*Cent orharaj belulinoj
La turniron spektis digne.
Ĉiuj — kiel kampaj floroj,
Sole mia kiel rozo.
Mi rigardis ŝin kuraĝe,
Kvazaŭ aglo al la suno.
Kaj de miaj ardaĵ vangoj
Ekflamiĝis viziero!
Kiel strebis kor' penetri
Tra l' kiraso firma, peza!
Fajro de rigardoj helaj
Incendiis en animo;
La paroloj dolĉe-flustraj
Kirloventis en la koro;
Kaj ŝi mem — mateno juna —
Iĝis por mi fulmotondro;
Mi impetis, mi ekbatis —
Kaj nenio restis stari.*

AMIKECO

*Falinte de sur roka pec',
Per fulmoj frakasita, kuŝis kverk' en polvo;
Kun ĝi — hedera tig' en densa ĉirkaŭvolvo...
Jen vi, ho Amikec'!*

AL ŜI

*Kie nomo por vi?
Ne fortas la art' de mortuloj
Esprimi la ĉarmon de vi!*

*Liro mankas por vi!
Kial kantoj? Fuŝa resonado
De tarda babilo pri vi!*

*Se mia koro kapablus
Eksoni, do ĉiu sento
Estus la himno por vi!*

*Ĉarmon de via viv',
La imagon puran kaj sanktan —
Portas mi kaŝe en kor'.*

*Mi povas nur ami,
Sed diri, kiel amatas vi,
Povas eterne ja nura!*

MORTO

*Stultulo diris tion kaj stultuloj trudas,
Ke morto kvazaŭ kreas plendon de horor'!
Dum vivas ni en mondo — ĝi nin ne apudas;
Sed se alvenis ĝi — do ni jam estas for!*

AL LA PORTRETO DE GOETHE

*Por leĝo prenis li kuraĝon de liber',
Per ĉionvida penso super mondo brilis,
Konceptis mondon li ĝis lasta er' —
Kaj al nenio li humilis.*

EPITAFIO AL LUKSULO

*Jen kuŝas delicul' — li vivis sen modero!
Pro tio ŝuldis pli kaj pli!
Sed pagis li
La solan ŝuldon — al la tero!..*

EPITAFIO AL LIRIKA POETO

*Pamfilo jen — de pompaj odoj la aŭtor'!
Pekulo tiu ĉi — pardonu Di-sinjor'! —
Postmorte vivi ja aspiris! —
Sed viva teren iris!*

EPIGRAMO

*“Ĉu dramon verkis, Fefil, vi en ver'?” —
“Jes! Vere la sukces' perfekta! Ĉu vi kredas —
Neniu fajfis dum la scena premier'!” —
“Eh, Fefil! Kiel oni fajfus, dum oscedas!”*

LA GRANDA PENSO

*La ran' ekpensis: Mi estiĝos kiel bov'.
Eĉ kvankam krevos mi — sed eminentas prov'!*

REMEMORO

*Pri la kunuloj karaj, kies vivo flu'
Por ni la mondon igis hele brili,
Ne diru kun sopir': “ne plu”,
Sed kun dankemo: “estis ili”.*

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**





Emma Zunz

de Jorge Luis Borges

La 14an de januaro 1922 Emma Zunz*, je sia reveno el la teksaĵfabriko Tarbuch kaj Loewenthal, trovis fone de la vestiblo leteron senditan el Brazilo, kiu sciigis ŝin pri la morto de ŝia patro. Je unua vido, ŝin trompis la poŝtmarko kaj la koverto; poste ŝi maltrankviliĝis pro la nekonata skribo. Deko da fuŝaj linioj intencis pleniĝi la paĝon; Emma legis, ke sinjoro Maier erare englutis tro grandan dozon da veronalo kaj forpasis la trian de la monato en la malsanulejo de Bagé*. La sciigon subskribis iu Fein aŭ Fain, el Riogrande*, kiu ne povis scii, ke li adresas sin al la filino de la mortinto.

Emma lasis fali la paperon. Ŝia unua sento estis misfarto en la ventro kaj doloro en la genuoj; poste, ŝi sentis blindan kulpon, malrealecon, malvarmon, timon; poste, ŝi deziris esti jam en la tago sekva. Senprokraste ŝi komprenis la vanecon de tiu deziro, ĉar la morto de ŝia patro estis la sola afero, kiu iam okazis en la mondo, kaj kiu plu okazados senfine. Ŝi reprenis la paperon kaj iris al sia ĉambro. Ŝtele ŝi metis ĝin en tirkeston, kvazaŭ iel ŝi jam konus la okazaĵojn. Eble ŝi komencis diveni ion; ŝi estis jam tiu, kiu ŝi estos.

En la kreskanta malhelo Emma priploris ĝis la fino de tiu tago la memmortigon de Manuel Maier, kiu en la malnovaj feliĉaj tempoj nomiĝis Emanuel Zunz. Ŝi rememoris somerumojn en bieno, apud Gualeguay*, rememoris (provis rememori) sian patrinon, rememoris la dometon en Lanús*, poste foraŭkciitan, rememoris la flavajn rombojn de iu fenestro, rememoris la aŭton de la malliberejo, la malhonoron, rememoris la anonimajn leterojn kun la eltondaĵo pri “la defraŭdo de la kaskisto”, ŝi rememoris (tamen neniam

forgesinte), kiel ŝia patro dum la lasta nokto ĵuris, ke la krimon faris Loewenthal, Loewenthal, Aarón Loewenthal, antaŭe direktoro de la fabriko, nuntempe unu el la posedantoj. Ekde 1916 Emma gardis la sekreton. Al neniu ŝi ĝin malkaŝis, eĉ ne al sia plej bona amikino, Elsa Urstein. Eble ŝi volis eviti profanan nekredemon; eble ŝi kredis, ke la sekreto estas ligilo inter ŝi kaj la forstanto. Loewenthal ne sciis, ke ŝi scias; ĉi tiu eta fakto havigis al Emma Zunz ian senton de potenco.

Ŝi ne dormis tiun nokton, kaj kiam la unuaj lumradioj konturis la fenestrokvadraton, ŝi havis jam perfektan planon. Ŝi zorgis, ke la tago, kiu ŝajnis al ŝi senfina, estu kiel ajna alia tago. En la fabriko oni parolis pri striko; Emma deklaris sin, kiel ĉiam, kontraŭ ĉia perforto. Je la sesa, post la laborfino, ŝi iris kun Elsa al virina klubo, kun gimnastejo kaj naĝbaseno. Ili enskribiĝis; ŝi devis ripeti kaj literumi ambaŭ siajn nomojn; devis bonmieni al la krudaj ŝercoj akompanaj al doktora ekzameno. Kun Elsa kaj la pli juna fratino Kronfuss ŝi pridiskutis, kiun kinejon viziti dimanĉon posttagmeze. Poste temis pri junuloj, kaj neniu atendis, ke Emma kunparolu. En aprilo ŝi atingos dek naŭ jarojn, sed viroj kaŭzis al ŝi, ankoraŭ, timon preskaŭ patologian... Reveninte hejmen, ŝi kuiris tapiokan supon kaj kelkajn legomojn, manĝis frue, enlitiĝis kaj devigis sin dormi. Tiel, per laboro kaj ordinare, pasis la dek-kvina, vendredo, la tago antaŭa.

Sabate la senpacienco ŝin vekis. La senpacienco, ne la maltrankvilo, kaj la unike senpeziga sento, ke ŝi trovas sin en tiu tago, fine. Ne plu ŝi devis teksi planojn kaj imagojn; ene de kelkaj horoj ŝi ja atingos la simplon de la faktoj. En

*La Prensa** ŝi legis, ke la ŝipo *Nordstjärnan*, el Malmö, forveturos venont-nokte el la doko 3; ŝi telefonis al Loewenthal, aludis, ke ŝi volus komuniki al li, sen ke aliaj sciu, ion rilatan al la striko, kaj promesis viziti lin en la oficejo je vesperiĝo. Tremis ŝia voĉo; ĉe denuncanto tremo konvenas. Neniu alia memorindaĵo okazis tiun matenon. Emma laboris ĝis la dek-dua, interkonsentis kun Elsa kaj kun Perla Kronfuss la detalojn de la dimanĉa promeno. Post manĝo ŝi enlitiĝis kaj, la okulojn fermitajn, ripetis al si la planon. Ŝi pensis, ke la fina etapo estos malpli terura ol la unua, kaj sendube havigos al ŝi la guston de venko kaj justico. Subite ŝi ekstaris alarmite, kuris al la komoda tirkesto. Ŝi malfermis ĝin: super portreto de Milton Sills* kuŝis, samloke kie ŝi metis ĝin la jaŭdan vesperon, la letero de Fain. Neniu povis ĝin vidi; ŝi eklegis ĝin, kaj disŝiris.

Estus malfacile, kaj eble ankaŭ malkonvene, raporti realisme pri la eventoj de tiu posttagmezo. Inter la karaktertraĵoj de l' o infera estas malrealeco; traĵto kiu ŝajnas mildigi ties teruron, sed kiu ĝin eble pliakrigas. Kiel igi verŝajna iun agon, je kiu preskaŭ ne kredis ties plenumanto, kiel rekrei la momentan kaoson, kiun la memoro de Emma Zunz hodiaŭ forpuŝas kaj konfuzas? Emma loĝis en la kvartalo Almagro, strato Liniers; ni havas la scion, ke en tiu posttagmezo ŝi iris al la haveno. Eble en la misfama Promenejo de Julio ŝi vidis sin multobla en la speguloj, abunde prilumata, nuda antaŭ okuloj malsatantaj; tamen pli racie estas supozi, ke komence ŝi vagadis nerimarkita, meze de indiferenta amaso... Eniris du aŭ tri drinkejoj, vidis la rutinojn kaj manipulojn de aliulinoj. Fine ŝi trovis la virojn de la

Nordstjärnan. Pri unu el ili, tre juna, ŝi timis, ke li povus inspiri al ŝi teneron, kaj ŝi elektis alian, eble malpli altan ol ŝi kaj krudaspektan, por ke la pureco de teruro restu sen mildigo. La viro kondukis ŝin al iu pordo, poste al malhela enirejo, poste sinua ŝtuparo, poste vestiblo (kiu havis vitralon kun romboj tute kiel en la domo de Lanús), poste al koridoro, kaj poste al pordo, refermiĝanta. La gravaj eventoj estas ekstertempaj, ĉar ĉe ili la tujan pasintecon kvazaŭ distranĉas la futuro, ĉar ne ŝajnas sinsekvaj la partoj kiuj ilin kunformas.

En tiu tempo ekstertempa, en tiu perpleksa malordo de sentoj senkoheraj kaj hororaj, ĉu Emma Zunz eĉ *unu solan fojon* pensis pri la mortinto kiu motivis ŝian sinoferon? Mi kredas, ke ŝi tiel pensis unu fojon, kaj ke en tiu momento ŝi endanĝerigis sian malesperan projekton. Ŝi pensis (ne povis ne pensi), ke ŝia patro iam faris al ŝia patrino la teruraĵon nun al ŝi faratan. Ŝi pensis tion kun senforta miro, kaj tuj fuĝis en vertiĝon. La viro, sveda aŭ finna, ne parolis hispane; li estis instrumento por Emma, same kiel ŝi por li, sed ŝi servis por la ĝuo kaj li por la justico.

Kiam ŝi restis sola, Emma ne tuj malfermis la okulojn. Sur la noktotablo la viro lasis monon; Emma eksidis kaj disŝiris la bileton, same kiel ŝi faris kun la letero. Disŝiri monon estas malpie, kiel panon forĵeti; apenaŭ ŝirinte, Emma jam pentis la faron. Kia orgojlaĵo, kaj ĝuste en tiu tago... La timo dissolvigis en la tristo de ŝia korpo, en la naŭzo. La naŭzo kaj la tristo katenis Emman, sed fine ŝi leviĝis kaj komencis sin vesti. En la ĉambro ne restis viglaj koloroj; la vesperkrepusko atingadis sian finon. Emma povis eliri nerimarkite; ĉe la stratangulo ŝi entramiĝis al okcidenta direkto. Laŭ sia plano, ŝi elektis la plej antaŭan sidlokon, por ke oni ne vidu ŝian vizaĝon. Eble konsolis ŝin kontroli, tra la banala trafiko de la stratoj, ke tio, kio ĵus okazis, ne infektis la aĵojn. Ŝi veturis tra kvartaloj malkreskantaj, mornaj, vidante kaj tuj forgesante ilin, kaj eltramiĝis ĉe stratkruciĝo de la avenuo Warnes. Paradoxse, ŝia laco transformiĝis en forton, ĉar ĝi devigis ŝin koncentriĝi al la detaloj de la aventuro, kaŝante al ŝi la motivon kaj la celon.

Aarón Loewenthal estis konata al ĉiuj kiel serioza homo; al siaj malmultaj intimuloj, kiel avarulo. Li vivis en supra etaĝo de la fabriko, sola. Loĝante en tiu kaduka antaŭurbo, li timis ŝtelistojn; en la korto de la fabriko li tenis grandan

hundon, kaj en sia skribotabla tirkesto, kiel ĉiuj sciis, revolveron. En la antaŭa jaro li dece funebris la neatenditan morton de sia edzino — el la familio Gauss, alportinta bonan doton! — sed lia vera pasio estis mono. Animprofunde, li hontis esti malpli kapabla gajni ĝin ol konservi. Li estis tre religiema, kaj kredis havi sekretan pakton kun la Sinjoro, laŭ kiu preĝoj kaj devoteco malŝarĝas lin de la devo bone agi. Kalva, korpulenta, blond-barba, en funebra vesto kaj kun nazumo fumkolora, li atendis stare ĉe la fenestro la konfidencan komunikon de laboristino Zunz.

Li vidis ŝin enpuŝi la pordokradon (kiun li intence lasis duonferma) kaj transiri la malluman korton. Li vidis ŝin fari etan flankeniron, kiam la ĉenita hundo ekbojis. La lipoj de Emma moviĝis kvazaŭ en mallaŭta preĝo; lacaj ili ripetadis la verdikton aŭdotan de sinjoro Loewenthal antaŭ la morto.

Ne ĉio tiel okazis, kiel Emma Zunz antaŭvidis. De post hieraŭ frumatene, ŝi multajn fojojn imagis, kiel ŝi firme levos la revolveron, devigos la mizerulon konfesi sian mizeran kulpon, kaj klarigos al li la sentiman stratagemon, kiu ebligas al la justico de Dio triumfi super la justico de homoj. (Ne pro timo, sed estiel instrumento de la justico, ŝi ne volis esti punata.) Poste sola kuglotrafo en la bruston sigelos la sorton de Loewenthal. Sed ne ĉio tiel okazis.

Fronte al Aarón Loewenthal, Emma sentis malpli da urĝo venĝi sian patron ol venĝi pro la hontaĵo, kiun ŝi suferis. Ŝi ne povis ne mortigi lin, post sia funde planita senhonorigo. Ŝi ankaŭ ne povis perdi tempon por ceremonioj. Sidante, ŝi timeme pardonpetis al Loewenthal, invokis (estante denunciato) la devojn de lojaleco, eldiris iujn nomojn,

subkomprenigis kelkajn pliajn, kaj subite haltis, kvazaŭ tim-bremsita. Ŝi atingis, ke Loewenthal eliru por alporti glason da akvo. Kiam la viro, hezita kredi ŝian teatrumadon sed indulgema, revenis el la manĝosalono, Emma estis preninta el la tirkesto la pezan revolveron. Ŝi premis la ellasilon du fojojn.

La ampleksa korpo falis, kvazaŭ la pafbruoj kaj la fumo ĝin disrompus, frakasiĝis la akvoglaso, la vizaĝo rigardis ŝin kun surprizo kaj kolero, la buŝo en la vizaĝo insultadis ŝin hispane kaj jide. Ne ĉesis la sakrado; Emma devis pafi plian fojon. En la korto la katenita hundo komencis boji, kaj fluo da bruska sango verŝiĝis tra la obscenaj lipoj, makulante la barbon kaj la veston. Emma komencis la preparitan akuzadon (“Mi venĝis mian patron, kaj oni ne povos min puni”), sed ne finis ĝin, ĉar sinjoro Loewenthal jam mortis. Ŝi neniam eksciis, ĉu li ankoraŭ povis ŝin kompreni.

La nervoza bojado memorigis, ke ŝi ankoraŭ ne rajtas ripozi. Ŝi malordigis la divanon, disbutonis la jakon de la kadavro, forprenis la priŝprucitan nazumon kaj metis ĝin sur aktoŝranketon. Poste ŝi prenis la telefonon kaj ripetis, kion ŝi poste ripetados tiom da fojoj, per samaj aŭ aliaj vortoj: *Okazis io tute nekredbla... Sinjoro Loewenthal venigis min pretekste de la striko... Li perfortis min, mi mortigis lin...*

La historio estis efektive nekredbla, sed ĉiuj ĝin akceptis, ĉar esence ĝi estis reala. Vera estis la tono de Emma Zunz; vera ŝia pudoro; vera ŝia malamo. Ankaŭ la hontaĵo, kiun ŝi suferis, estis vera; falsaj estis nur la cirkonstancoj, la okaz-tempo, kaj la nomoj de unu aŭ du homoj.

Tradukis el la hispana **István Ertl**

NOTOJ

Emma Zunz [legu: Cunc] aperis en la novelaro *Alef* (1949), kaj de tiam ĝi estis plurfoje reeldonita kaj tradukita al multaj lingvoj. Laŭ ĝi estis faritaj filmoj de Leopoldo Torre Nilsson (1954) kaj Alain Magrou (1969). La traduko de István Ertl aperos ĉi-aŭtune en la kolekto *La sekreta miraklo* ĉe la eldonejo *Sezonoj*.

Zunz. Nomo eventuale elektita omaĝe al la german-juda klerulo Leopold Zunz (1794–1886), pioniro de la scienca esplorado pri judismo.

Bagé. Urbo en la sudo de la brazila ŝtato Riogrando, proksime al Urugvajo.

Riogrando. La plej suda brazila ŝtato, lime de Argentino kaj Urugvajo (Rio Grande).

Gualeguay. Provinca urbo kaj departemento en orienta Argentino, inter Bonaero kaj Urugvajo.

Lanús. Mezklasa distrikto sudokcidente de Bonaero.

La Prensa. Unu el la ĉefaj argentinaj taggazetoj.

Sills, Milton (1882–1930). Usona teatra kaj filma aktoro, debutinta en 1915, populara pro romantikaj roloj en silentaj filmoj.

La Karavelo plu navigas

En la junuara kajero de *La Ondo* Valentin Melnikov jam recenzis la literaturan ret-revuon *La Karavelo*. Kiel promesis ĝia eldonanto kaj redaktoro, João José Santos, post ses revunumeroj aperis la papera versio nigre-blanka, en formato A4. La revuo celas prezenti la portugallingvan literaturon, kreitan en diversaj landoj. Nur kvarono da spaco restas por alilingvaj tradukoj kaj originalaĵoj.

Santos zorge pripensis kaj konsekvence realigas tiun ĉi projekton per kunlaboro de kelkaj personoj, sed li mem multon tradukas, prinotas, kaj eseeas. Tiel ĉiunumere Santos prezentas po tri pecoj el la epopea poemaro *Mesaĝo* de Fernando Pessoa, enkondukante per biografia skizo kaj klarigo pri traduk-principoj.

Paulo Sérgio Viana prezentas la rimarkindan rakontiston Machado de Assis kaj gustumigas ĉerpaĵon el lia romano *Postmortaj rememoroj de Brás Cubas*.

Certe ĉeestas revue Kamonio (Camões), “la plej genia poeto de la portugala lingvo” per biogramo kaj fragmento el *La Luzidoj* kaj sonetoj.

Aperas ankaŭ historirilataj, etnografiaj kaj literaturologiaj artikoloj. Ĉirkaŭ la revuo formiĝis internacia aro da konstantaj kunlaborantoj, aperas paĝoj el la literaturoj greka, latina, hungara, pola, nederlanda... Oni trovas mallongajn eseojn esperantotemajn kaj recenzojn. Estas bona proporcio inter poezio kaj prozo.

Inter la pozitivaj trajtoj mi menciuj multajn bildojn — fotojn kaj reproduktitaĵojn, ne nur tre bonkvalitajn, sed ankaŭ en harmonia rilato kun la teksto. Iujn mi tre ekŝatis kaj plezure revenas al ili. Mallongajn sinprezentojn de la kunlaborantoj garnas nepra fotoportreto.

Perfekte estus, se similan esperantlingvan revuon havus ankaŭ aliaj literaturoj: anglalingva, germanlingva, francilingva, hispanlingva... Kaj se tiuj revuoj ekzistus kaj kunfandiĝus — ni havus veran revuon, kiu memorigus la popularan ruslingvan *Eksterlanda literaturo*, kies celo estis prezenti la alilingvajn literaturojn por la ruslingva legantaro.

La Karavelo estas senpage legebla en la reto (www.esperantopt.com), kaj abonebla:

✉ Fonte Velha, Caixa 3003, 71000-078 Estremoz, Portugalio


📧 lakaravelo@gmail.com.

Halina Gorecka

Deteni de fatala misago

Monteiro, Gerson Simões. *Memmortigo kaj ĝiaj konsekvencoj: La Memmortiginto en la Spirita Mondo kaj en la Reenkarniĝo* / Trad. el la port. Givanildo Ramos Costa. — Rio-de-Janeiro: Spiritisma Eldona Societo F.V. Lorenz, 2007. — 79 pĝ.

Kiam franca kuracisto Hippolite Rivail, konata kiel Allan Kardec, meze de la 19a jc. aranĝis siajn unuajn spiritismajn seancojn, li apenaŭ supozis, ke spiritismo prosperos en la transoceana Brazilo. Eĉ pli mirigus lin, ke tio okazos dank’ al eltrovaĵo de alia kuracisto, judo el Bjalistoko, kiu naskiĝos tri jarojn post la apero de unua libro de Kardec.



La nova libro de S.E.S. Lorenz traktas sinmortigon el la spiritisma vidpunkto. Ĝi klarigas tiun problemon sub nekutima vidangulo de kredo pri senmortaj spiritoj — homaj animoj — kiuj post la morto, elkarniĝinte, venas spiritan mondon kaj post certa tempo revenas la teron en alia korpo. Same kiel aliaj religioj, spiritismo nomas sinmortigon peko, sed, male al kristanismo, diras ke ĝi ne estas nepardonebla peko. Sed ĉiu peko bezonas reaĉeton. La aŭtoro metis multajn rakontojn de sinmortige elkarniĝintaj spiritoj, kiuj kontaktas la mondon de vivuloj pere de medioj. Jen la kerno de tiuj rakontoj:

La unua elreviĝo, kiu atendas ilin, estas la realaĵo de la spirita vivo... kaj tiu vivo pli malboniĝas pro teruraj turmentoj, kaŭze de ilia decido ege ribela.

Memmortigintoj ekzistas kaj daŭre spertas fizikajn suferojn... Longajn jarojn, ili sentas terurajn impresojn de la toksaĵo, kiu nuligis iliajn energiojn; ili sentas la taboron en la cerbo per fremda kuglo veninta el la pafilo uzita en la terurega ago; ili sentas la pezon de la ege pezaj radoj, sub kiujn ili ĵetis sin

kun dezirego forlasi la vivon; ili sentas la pasadon de... akvoj sur siaj restaĵoj, kie ili serĉas la kriman forgeson de siaj taskoj en la mondo. Kaj, ordinare, la plej malbona emocio de la memmortiginto estas travivi, minuton post minuto, la diseriĝan procezon de la forlasita korpo en la sino de la tero, plena de vermoj kaj putraĵoj.

La aŭtoro atentigas, ke la naskiĝon de infanoj kun korpaj kaj psikaj difektoj kaŭzas suicido en antaŭa vivo. Sinmortigintoj per kuglo reenkarneblas blindaj, mutaj, mense malfruaj aŭ eĉ plenaj idiotoj depende de la centroj de la cerbo trafataj de kuglo; sinpendumintoj riskas kripliĝi pro subita falo dum la unuaj tagoj de sia nova vivo; skizofrenio estas rezulto de memmortigo post murdo ktp.

Monteiro emfazas, ke eĉ penseto pri memmortigo estas danĝera, ĉar nevideblaj spiritoj tuj ekobsedas tiun, kiu enlasas tiajn pensojn en sian kapon. Tiel klariĝas, ekzemple, strangaj voĉoj sugestantaj ideojn pri sindetruo aŭdataj de psike malfortaj homoj.


Terure aspektas ankaŭ la loko, kien venas animoj de suiciduloj. Laŭ iliaj mesaĝoj, ĝi estas plene dezerta regiono, kun kaverno kaj abismoj, fetora kaj malpurega grundo, sufoka aero. Ilin akompanas malamikaj spiritoj kies kriaĵoj kaj ululoj plimalbonigas ilian mizeran staton. Tamen poste la animojn de memmortigintoj forprenas spiritoj-helpantoj kaj enkondukas ilin en aliajn regionojn de nevidebla mondo, kie ili ricevas spiritan kuracadon antaŭ nova reenkarneĝo.

Kio ĝi estas? Skeptika racio subŝovas minimume tri variantojn. Unue, tio estas banala ĉarlatanaĵo de medioj, kies celo estas memriĉiĝo koste de kredemaj profanoj. Due, ili mem estas viktimoj de psika malsano kaj ĉiuj mesaĝoj de spiritoj estas nura ĝia simptomo. Trie, iuj nevideblaj fiuloj el eble ekzistanta spirita mondo ŝercetas kun la homoj. Sed la afero ne estas tiom simpla. Kardec en siaj verkoj neas la eblecon pruvi la ekziston de spiritoj per fizikaj rimedoj, tamen, laŭ li, logika demando permesas malkaŝi spiritojn-mensogulojn.

Laŭ mia amatora opinio, la libro estas interesa kiel ekzemplo de alternativa vidpunkto al nia mondo, sed iom superŝarĝita de emocioj kaj “fortaj” scenoj kiel en brazila melodrama serio. Tamen tio ne gravas, se tiuj teruraj priskriboj kaj larmigaj rakontoj detenas almenaŭ unu homon de fatala misago kaj konservas ies vivon.

Nikolaj Penĉukov

La Verko de la Jaro 2007



(HeKo) Plebiscita rezulto favore al *La lingvo serena* de Baldur Ragnarsson (eldonis *Edistudio*), kiun pli ol 50% de la balotintoj elektis *La Verkon de la Jaro 2007*. La 800-paĝa libro enhavas

ankaŭ eseojn, sed la laŭron la abonantaro de *Literatura Foiro* asignas nur pro poezio, do la elekto premias Ragnarsson la poeton; tio ne signifas aŭtomate, ke lia talento de poeto superas tiun de recenzisto, kvankam probable tiel estas. Efektive nia literaturhistorio memorus la islandanon kiel poeton (originalan kaj tradukan) multe pli ol kiel eseiston.

Kiel okazis por *En barko senpilota* de William Auld, *La lingvo serena* celas kunmeti la tutan originalan verkaron de unu aŭtoro. Tamen, rilate al poezio, ne temas nur pri la kunigo de *Ŝtupoj sen nomo* (1959) kaj *Esploroj* (1974): aperas multaj neeldonitaĵoj, kiuj igas la poetan itineron atentinda ne nur retrospektive.

Baldur Ragnarsson debutis antaŭ kvindek jaroj en la poezia sulko plugita de Kolomano Kalocsay per *Ebria ekvatoro*, kaj plu de Arthur Dawson Foote, William Auld, Marjorie Boulton. Lia unua poemaro *Ŝtupoj sen nomo* estis ja salutita de Clelia Conterno Guglielminetti kiel “la lasta paŝo” por eniri “la landon de l’ mistero, de l’ hermetiko”. Sed la esperanta poezio alvenis al tiu evolustadio tre malfrue kompare kun la nacilingvaj: hermetismo restis kurtsezona fenomeno, elĉerpita jam en la 1970aj, eĉ antaŭ la malmalica reago (aŭ reakcio, laŭ liaj diskreditantoj) de Johán Valano. Ne hazarde, post *Esploroj* pasis pli ol tridek jaroj, ĝis la nuna, tria poemaro de Ragnarsson.

La esperantlingva hermetismo, kies lastaj pintaj figuroj estis Ragnarsson kaj de Kock, esence kriziĝis ĉar ĝi ne sukcesis plene asimili la hermetan esprimidealon, laŭ kiu vorto anstataŭas frazon. Kroĉante sin al elementoj de kontraŭfundamenteco, kiel en elizio aŭ artikolita prepozicio (ĉe Edwin de Kock), niaj hermetistoj kultivis futurismon pli ol hermetismon: ne dudekjara, sed kvardekjara malfruo (aŭ malavano). Tiu-rilate *La lingvo serena* donas la okazon esplori la evoluon de poeto post la sperto en iama avangardo kaj longa ekstera (nur ekstera) silentado.

La lingvo serena redonas al la publiko poeton de la fora nordo, tiu nordo kiu multe kontribuis, interalie per *Norda Prismo*, al la montevidea renesanco. Ĝi ankaŭ eligas aŭtentan poeton el la tunelo kien la involucio postkaloĉaja (kun sia piĉisma ekstremo) pelis unujn; tunelo tiel malhela kiel la funelo kien la reago antikaloĉaja (kun sia bonlingvisma ekstremo) faligis aliajn.

Trans la propra valoro, *La lingvo serena* estas ankaŭ sukcesa merkata operaco, kombino de eldona kompetento kaj premgrupa apogo (EVA). Tio eble montras transiron el epoko de aŭtoroj markitaj per (lingva) ideologia orientiĝo al epoko de verkistoj sponsoritaj de komerca (kaj frakcia) pegazo.

Giorgio Silfer

Wikipedia: cent mil artikoloj



La Esperanto-vikipedio nun havas pli ol cent mil artikolojn, Esperanto estas la 20a lingvo, kiu atingis tiun kvanton.

La 100.000a artikolo traktas la temon “monfalsado”. Ĝin enmetis 16 jun je 8h49 (laŭ la Universala Tempo) la uzanto “Alaŭdo”.

Ĉiutage la Esperanto-Wikipedia (<http://eo.wikipedia.org>) kreskas per mezume 40 artikoloj kaj kelkaj centoj da aldonoj kaj redaktoj de jam ekzistantaj artikoloj.

La kunlaborantoj venas el pluraj dekoj da landoj kaj tial povas enmeti la scion el multaj diversaj kulturoj de la mondo en la Esperanto-vikipedion.

Entute la Esperanto-versio de la interreta enciklopedio entenas ĉ. 19 milionojn da vortoj, mezume estas do 190 vortoj por unu artikolo aŭ 20 linioj da teksto. Metante 600 vortojn sur unu paĝon ebla presita versio havus 30 mil paĝojn aŭ 100 volumojn de po 300 paĝoj.

Kelkaj artikoloj entenas nur frazon. Aliaj, kiel la artikoloj pri “delfenoj” aŭ pri la “Berlina muro” entenas detalajn prezentojn pri difinita temo.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

“La Ondo” partoprenos

19 – 21 sep 2008

ARKONES

en Poznań (Pollando)

La dua Spegulo

La duan numeron de soci-kultura revuo *Spegulo* enkondukas Kazimierz Leja, kiu dum kvin jaroj redaktis kaj eldonis *Polan Esperantiston* kaj spertis nekomprenon de iuj polaj esperantistoj. Li alvokas: “Ni lernu ĉiutage ekzisti en la libera mondo — libera de persekutado, politika prizonejo, sed ankaŭ libera por esprimi siajn pensojn, opiniojn, kritikon”.

Ĝuste tian, tabuan por la pollanda socio, temon — antisemitismo en Pollando — frontas Andreas Künzli, bazante siajn konsiderojn sur la varia percepto de la kritiko de Jan Tomasz Gross. Libro de la pola-usona historiisto *Timo* ricevis en Pollando krudan kritikon, precipe el la ekleziaj rondoj.

La centjariĝo de UEA medigitis Künzli pri la nuna stato de la tutmonda Esperanto-agado. La sama aŭtoro analizas la koncepton de la internacia paca ordo tra la artikolaro de Hector Hodler el la jaroj 1915–1917.

La forpasintan Claude Piron omaĝas nekrologo kaj liapluma *Esperanto, ĉu verko de Dio?*

Tomasz Chmielik per siaj tradukoj kaj biogramoj prezentas tri orienteŭropajn verkistojn. En la eseo *Jugoslavio, toys for boys* kroatino Dubravka Ugrešić montras la disfalon de Jugoslavio kaj ties postsekvojn en la novaj ŝtatoj. Komplementas tiun dolorigan temon poemoj de kosovano Eqrem Basha. Per roman-fragmento el *Kaprido por du groŝoj* la legantoj konatiĝas kun la juda ekslitovia (nun israela) verkisto Grigorij Kanoviĉ, verkanta grandparte en la rusa lingvo. La sorto de liaj samgentanoj estas la temo de ĉiuj liaj romanoj.

Tomasz S. Chmielik (la filo) daŭrigas prikinortan serion per *Kieślowski: Tri koloroj — Blanka*. Jerzy O. ĉi-foje rakontas pri Bessie Smith — la imperiestrino de bluso, kaj Manuel mallonge enkondukas al la verdkaba muziko. Recenza fako ĉeestas per kontribuo de Zdravko Seleš pri *Mediterranea breviero* de Predrag Matvejević (trad. T. Chmielik), represita el *Zagreba Esperantisto*.

Fine la redakcio anoncas laŭreatojn de sia propra premio — statuetoj de *Spegulo*.

La trimonata 64-paĝa *Spegulo* estas abonebla ĉe la eldonejo *Hejme*: ✉ PL 41-250 Czeladź, ul Wąska 21/3, Pollando, ✉ spegulo@hejme.com.pl.

Halina Gorecka

Enciklopedio de Esperanto


La *Enciklopedio de Esperanto* estas populara leksikono kaj samtempe unu el la ĉefaj referencaj verkoj pri la historio de la Esperanto-movado. La laboron pri ĝi komencis la ruso Ivan Ŝirjaev (1877–1933), kiu dum kelkaj jaroj ĝis majo 1930 kompilis 2092 alfabete ordigitajn artikol(et)ojn sub la titolo *Esperanto-Enciklopedio*. Pro siaj meritoj li ricevis la titolon *iniciatinto-ĉefredaktoro*. En 1931 Ŝirjaev sendis la rezultojn de sia laboro al la eldonejo *Literatura Mondo* en Budapeŝto.

Post lia morto en 1933 la projekto estis daŭrigita kaj efektivigita sub la redaktado de la hungaroj Lajos Kókény kaj Vilmos Bleier, en kunlaboro de 57 kontribuantoj. La taskon de la lingva redaktoro transprenis Kálmán Kalocsay.

En la antaŭparolo al la enciklopedio estas emfazita la fiero, ke ĝi povas esti nomata “la sola verko en Esperanto, al kiu kunlaboris anoj de ĉiuj tendencoj en la movado”. Finfine la eldonejo ricevis tekston por 640 paĝoj kun po 4200 preslitteroj kaj bildmaterialon por ĉ. 300 paĝoj. La nombro de biografioj estis indikita per 1500. Tio estis pli ol la duoblo de la anticipe fiksita amplekso. Do la verko fariĝis “ne nur simpla manlibro por elementaj bezonoj, sed verko taŭga ankaŭ por pli altaj pretendoj de propagandistoj, literaturistoj, lingvistikemuloj”, kiu “etendiĝas sur ĉiuj kampoj de la Esperanta vivo: movado, lingvo, literaturo”.

Pri eblaj mankoj de la libro la redaktoroj avertis. Oni skribis en la antaŭparolo inter alie, ke la unuopaj artikoloj estas nekompletaj aŭ tro skizaj, ke la amplekso de la artikoloj ne estas proporcia, ke informoj povas esti subjektivaj, ktp. Ĉiukaze la kompilantoj de la teksto “klopodis je plejebla grado de objektiveco”, kvankam kontraŭdiroj ne estas ekskludeblaj; krom tio “la leganto devas mem formi al si opinion” pri “afe-roj nedeciditaj”.

La rubrikoj, kiuj konsistigas la enciklopedion, prezentas krom biografiojn ankaŭ landojn, urbojn, organizaĵojn, lingvistikaĵojn kaj enhavas indikojn pri ĉ. 450 Esperanto-libroj, kiuj estas nutritaj per notoj el publikigitaj recenzoj. Rilate la lingvan uzon oni ŝparis pri neologismoj. La artikolon pri Japanio oni ja decidis aperigi sub *Nipono*, sed tio ŝajnas esti escepto. Kaj ĉar oni ne volis krei iun akademiecan



La *Ekciklopedion* en la biblioteko de *La Ondo* jam trivis la temo kaj la ofta uzado.

verkon, kiun legantoj sen universitata klereco eble ne uzos, oni aplikis “simplan kaj facilan stilon, bone kompreneblan ankaŭ al komencantoj”. Pro tio pri la taŭgeco de la titolo “enciklopedio”, kiu povus impresi “iel scienceme kaj seke”, ekzistis duboj. Mankojn kaj erarojn oni esperis ĝustigi en dua eldono aŭ en suplemento (kio poste neniam efektiviĝis). Ĉiukaze en la antaŭparolo oni sentas entuziasmon por tiu unika projekto, kiu realiĝis en etoso de internacia kunlaboro de esperantistoj, kiuj konsciis pri la graveco de tia kolektumo de informoj pri la historio de la Esperanto-movado.

Enciklopedio de Esperanto aperis kiel duvoluma eldono de la eldonejo *Literatura Mondo* en Budapeŝto en la dua duono de 1934 (kvankam kiel aperojaro 1933 estas indikita). Aparte valora ero de la libro estis la plurparta bildo-serio sur pli bona papero kun interesaj fotoj, kiuj ĝis tiam povis esti trovitaj.

Represaĵo de la unua eldono estis eldonita kiel unulibra versio en Hungario ĉe Hungara Esperanto-Asocio en la jaro 1979, sed sen la fotoj, sub la respondeca redaktado de Vilmos Benzik, kaj en 1986 aperis represo de la reeldono 1979.

Librokritiko: *Enciklopedio de Esperanto* aperis en epoko, kiam en Germanio la nacisocialista partio de Adolf Hitler akaparis la politikan povon, montrante fortajn antisemitajn, rasismajn, militarismajn kaj imperiismajn tendencojn. En Hungario, kie la enciklopedio aperis, ekde 1932 regis Gyula Gömbös kiel ĉefministro, kiu evidente simpatiis kun tiuj tiam modaj politikaj direktoj. En sia propra lando li

starigis krudan reĝimon, akcelis la kunlaboron kun faŝisma Italio, serĉante ankaŭ la kunlaboron kun Germanio. En la enciklopedia artikolo sub Germanujo (p. 193) la ekregado far la nacisocialistoj je 30 jan 1933 estas registrita kaj la konsekvencoj por la Esperanto-movado priskribitaj. Ĉe multaj juddevenaj esperantistoj mankas la indiko pri ilia judeco (ekz. Kofman, Gernet, Belmont, Javal, k.a.), plej frape rimarkeble ĉe L.L. Zamenhof mem, kie ekzistas neniu klarigo pri lia juda fono, krom ke li loĝis en la hebrea kvartalo. Por la biografio de Zamenhof oni (t.e. G. Waringhien) kontentiĝis je la nura aperigo de la aŭtobiografia letero al Michaux (1905) plus kelkaj aldonaj notoj, en kiuj ĉiuj prijudaj aspektoj de la aŭtoro de Esperanto estas forlasitaj (kvankam tiam ekzistis *Vivo de Zamenhof* de E. Privat). Nur Lejzerowicz estas prezentata kiel aŭtentika “hebreo”. Ĉu tiuj faktoj havas iujn interligojn ne estas konate, same kiel neklare estas, ĉu la redaktoroj de la enciklopedio en tiuj por judoj danĝeraj tempoj intence ignoris, “forĝesis” aŭ simple ne konis la judecon de kelkaj gravaj esperantistoj.

Postaj klopodoj: En la 1970aj jaroj estis iniciatita nova laboro ĉirkaŭ *Enciklopedio de Esperanto*, sub la aŭspicio de Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj kun Ulrich Lins kiel ĉefredaktoro kaj Reinhard Haupenthal kiel redaktoro. En la revuo *Esperanto* (UEA) eĉ aperis provartikoloj en la senco de tiu nova enciklopedio. Tamen, pro diversaj kialoj, la manuskripto neniam finpretiĝis, despli ke en 1974 aperis la kolosa monografio de Lapenna/Lins/Carlevaro, *Esperanto en Perspektivo*, kiel frukto de prihistoriaj redaktoklopodoj. Sur paĝo 677 ĉi tiu libro eĉ raportis pri la aktuala stato de la enciklopedia laboro, kiu restis revo aŭ iluzio. Intertempe la malnova *Enciklopedio de Esperanto*, kiu povis konsideri nur la unuan duonjarcenton de la historio de Esperanto, estas nun 75-jara, kaj pasis 34 jaroj depost *Esperanto en Perspektivo*. Do sendube la Esperanto-movado urĝe bezonas aktualigon de sia enciklopedio laŭ modernaj sciencaj normoj. Nu, kun la disvastiĝo de la Esperanta Vikipedio en interreto, en kies redaktado povas principe ĉiu ajn partopreni, oni kredas, ke tiu nova formo de publikigo povos anstataŭi aŭ eĉ solvi la ĝisnunajn libromankojn.

Andreas Künzli



Literatura konkurso Liro-2008

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2008*.

Liro-2008 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: *Друзьям* de Pjotr Vjazemskij
4. Traduka prozo (el la rusa): *Бемоль* de Valerij Brjusov
5. Traduka prozo (el la angla): *Aloha Oe* de Jack London

En la branĉoj 1–2 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitaĵojn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2008.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La tekstoj de la tradukendaj verkoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2008. La organizanto ĝis 1 jan 2011 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro-2008*

Ricevitaj libroj

Bibliografie de traduceri din literatura română în limba Esperanto = Bibliografie de tradukaĵoj el la rumana literaturo en Esperanton / Antaŭpar. Jozefo E. Nagy. — Rotterdam: Bero, 2007. — 88 pĝ. — [Donaco de Bero].

Ekslibrisy esperanckie (Esperantaj exlibrisoj) Józefa Golca: Katalog wystawy / Komp. Mirosław Zbigniew Wojalski; Trad. el la pola Andrzej Brozi, Zofia Śmistek. — Łódź: WOW ZORA, 2008. — 36 pĝ., il. — [Donaco de Robert Kamiński].

Kongresa libro: Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj. Vilnius, 26-30 majo 2008 / Komp. Laimius Stračnickas. — Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2008. — 120 pĝ., il.; 300 ekz. — [Donaco de Aleksander Korĵenkov].

Monteiro, Gerson Simões. *Memmortigo kaj ĝiaj konsekvencoj: La Memmortiginto en la Spirita Mondo kaj en la Reenkarniĝo / Trad. el la portugala Givanildo Ramos Costa. — Rio-de-Ĵaneiro: Spiritisma Eldona Societo F.V. Lorenz, 2007. — 79 pĝ. — [Recenzoekzemplero].*

Moskvaj sonoriloj: Antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj / Komp., antaŭpar. Nikolao Gudskov. — M.: REU; Impeto, 2007. — 160 p.; 300 ekz. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Aŭstria Fervoĵisto. 2008/2; Aveno. 2008/31-32; Esperanto. 2008/5,6; FREŜO. 2008/15; Heroldo de Esperanto. 2008/6; Informilo por Interlingvistoj. 2008/2; Juna Amiko. 2008/1; Kataluna Esperantisto. 2008/345; La Fera Lupo. 2008/1,2,3,4; La Gazeto. 2008/136,137; La KancerKliniko. 2008/126; La Karavelo. 2007/1,2,3, 2008/4,5,6; La Movado. 2008/687; La Ondo de Esperanto. 2008/6; La Revuo Orienta. 2008/4; La Sago. 2008/43; Monato. 2008/6; Norvega Esperantisto. 2008/3; Pola Esperantisto. 2008/1,2,3; REGo. 2008/3; Scienco kaj Kulturo. 2008/2; Sennaciulo. 2008/4; Service de Presse. 2008/43; Spegulo. 2008/2; Tempo. 2008/1; Venezuela Stelo. 2007/80.

Gazetoj

Literatura Foiro, 2008, №232

La aprila numero de *Literatura Foiro* kiel organo de la Esperanto-Centro de PEN Internacia informas pri la kontribuo de la esperanto-verkistoj al la kampanjo de PEN mem favore al la esprimlibero en Popola Ĉinio.

István Nemere proponas premiere ĉapitron de sia nova romano. Geraldo Mattos, prezidinto de la Akademio de Esperanto, analizas la semantikan funkcion de la kazoj en nia lingvo. Giorgio Silfer esploras la historian epizodon de la Neŭtrala Moresneto, kiu en 1908 estis dum dek tagoj “sendependa ŝtato”, kun esperanto kiel oficiala lingvo.

Inter la klasikuloj antikvaj kaj modernaj, Francesco Petrarca estas la temo de eseo fare de Nicolino Rossi, kaj Grigorij Kanoviĉ estas prezentita per majstra traduko de Tomasz Chmielik. La aktualeco ankaŭ aperas, per artikolo de Marie-France Conde Rey pri la plej grava internacia festivalo de bildstrioj, kaj per intervjuo de Giorgio Silfer kun Marjorie Boulton, esperantlingva kandidato al la literatura Nobel-premio.

Multaj pliaj paĝoj da poezio, prozo, recenzoj altiras la legantojn.

La revuon *Literatura Foiro* posedas, eldonas kaj administras LF-koop. Ĉefredaktoro Ljubomir Trifonĉovski. Redakcia adreso: ✉ p.k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario, ✉ lofo@softhome.net.

Perantoj en 38 landoj. Internacia abontarifo 34 eŭroj, aervoja suplemento 8 eŭroj. Rabatoj por Esperantaj Civitanoj en Orienta Eŭropo (50%), Afriko (50%) kaj Latin-Ameriko (33%).

Provegzempleron petu de la administrejo: ✉ CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando ✉ lf-koop@esperantio.net.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la maja krucenigmo *Tri dimensioj* venis 18 respondoj. La ĝustajn respondojn sendis Jackie Huberdeau, Anne Jausions, Louise Marin (Francio), Hans Burkhard Dietterle (Germanio), Zbigniew Tylkowski (Pollando), Klara Ilutovič, Jurij Kivajev, Svetlana Konjašova (Ruslando). Po unu eraro (pri la sama demando) estis en la respondoj de Malcolm Jones (Britio), Erkki Kempainen (Finnlando), Ester Olsen (Norvegio), EK Olsztyn, Marianna Boharewicz, Dorota Burchardt, Mirosława Kubicka, Stanisław Placha, Hanna Skalska (Pollando).

La loto donis libropremion al *Anne Jausions*. Ni gratulas!

La ĝustaj respondoj: 1. gluo; 2. ovri; 3. osto; 4. sakuro; 5. liva; 6. skio; 7. opio; 8. psi; 9. omo; 10. miro; 11 (horizontale) pico; (vertikale) peso; 12. cifero; 13. romano; 14. kotono; 15. suflo; 16. trafi; 17. (horizontale) ornamo; (vertikale) odori; 18. odo; 19. neado; 20. (horizontale) mono; (vertikale) mia; 21. nur; 22. orli; 23. agro; 24. panaceo; 25. (horizontale) Romo; (vertikale) rikolti; 26. montras; 27. kano; 28. liro; 29. cent; 30. ikso.

Ni dankas ĉiujn legantojn, kiuj atentigis pri la eraro en la junia *Sudoku*. Se vi havas freŝajn ideojn por la rubriko kaj sentas sin kreema, sendu taskojn al la redakcia adreso. La plej interesaj taskoj estos premiitaj kaj publikigitaj en *La Ondo*.

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en kvadratoj 3×3, la ciferoj ne ripetigu. La respondojn bonvolu sendi al la redakcio antaŭ la 10a de septembro poŝte aŭ rete.

Kompilis **Aleksej Korĵenkov**

2						6		
	7	8			9			
3	4	6		2				
6					1	3		
8			4		2			6
		4	8					7
				1		9	4	2
			2			1	6	
		9						8



Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Murdo en Esperantujo: buĉu serie

...se vi volus mortigi UEAn, kiun servon necesus unuavice mortigi? kaj duavice? kaj triavice? (Giorgio Silfer // *La Ondo de Esperanto*, 2008, №6, pĝ. 13)

Mordo en Esperantujo: kanibalu neĵude

Mi volus tiun gojon dividi kun vi ĉiuj, kiuj ricevas mian mesaĝon. (Probal Daŝgupta. UEA 100-jara // *La Espero*, maj 2008, pĝ. 6; rimarkis Ionel Oneț)

Ni kaj ĝi

... d-ino Marjorie Boulton akceptis la kandidatigon, fare de la Esperanta PEN, al la literatura Nobel-premio... ĝi konvaleskas post enhospitaliĝo. (*Literatura Foiro*, 2008, №232, pĝ. 92)

Malpreĝo al malverdaj standardoj

... okazis unu malsolena internaciiga vespero, kie la partoprenantoj bruligis la surpapere pentritajn flagojn de siaj landoj ... dum oni kantadis ties himnojn. (Anna Raventós i Gascon. Vigla internaciiga renkontiĝo // *Kataluna Esperantisto*, 2007, №343, pĝ. 3.)

Ĉu spiritisme?

Renkontiĝas Chávez kun Fidel kaj Raúl. Dum tri horoj ambaŭ personecoj interŝanĝis opiniojn pri temoj ege transcendaj [transcendaj — I.E.] (17 jun 2008, <http://www.cuba-noticij.ain.cu/2008/0617encuentrochavez.htm>)

Witkam kompleksega: Ĉu 14.000 pold-eroj?

La novaĵo estas bazita sur vortlisto liverita de nia kliento Toon Witkam (Nederlando), kiu post plia ampleksigo havas 14.000 erojn. (*Stefan MacGill. Optika Karakstro-Rekono // La Fera Lupo*, 2008, №4, pĝ. 2; Rimarkis Lu Wunsch)

Forlasi eĉ forlason

La orlasita parto troviĝas ĉe <http://esperanto.lt>. (Vytautas Šilas, samloke, pĝ. 3)

Nun de poplo flugu ĝi al poplo

Kvazaŭ kolomboj de la paco, vaste disiĝinte tra ĉiuj kontinentoj, vi instigas fortigon de interpopla konkordo kaj firmigon de komunaj kontaktoj. (Petras Vaitiekūnas, ministro pri eksterlandaj aferoj de Litovia Respubliko, *Kongresa Libro de Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj*, pĝ. 7)

Obstina bararo

... Esperanto unuigas ĉiujn menciitajn obstaklojn. (Dainius Radzevičius, prezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio, samloke, pĝ. 9)

Plukis **István Ertl**

Montkabanoj por infanoj

Nur kelkaj Esperanto-familioj el Aŭstrio kaj Kroatio partoprenis en la 6a Familia Mont-Kabana Renkontiĝo 16–18 maj en montkabano Weizerhütte en nordorienta parto de Stirio, sudaŭstra provinco. Dum la gepatroj migris en montaro, infanoj bone amuziĝis ekstere kaj en la montkabano.

Vanja Radovanović

Leterkesto

Vendrede tagmeze la 30an de majo 2008 alvenis en Turku la junia numero de *La Ondo de Esperanto* poŝtigita laŭ la stampo lunde en Pollando. Tuj min katenis la skribaĵo pri la jubileulo mem. Por mi la pensoj kaj la maniero, per kiuj ili estas prezentataj, preparis ĉarman, sunbrilan kaj eĉ kortuŝan momenton de entuziasma leganto. Jam 18 jarojn mi pasigis en soleca hejmo post la forpaso de mia edzino. Iam kaj tiam tristaj faktoj atakas kaj provas konkeri min. Tre ofte *La Ondo* savis min kaj forpelis nubojn de mia anima mondo. Ĉefredaktoro devas antaŭ ĉio legi por profesiaj celoj, kaj mi feliĉulo celas nur plezuron, sed ankaŭ aldone ricevas kulturajn spicaĵojn. AIKo interese prelegas kaj talente skribas. Tion mi mem spertis. Kravato kaj aŭto ne estas necesaj helpiloj. Liaj bona koro kaj sindediĉo pluportas la torĉon ŝatatan de legantoj [...] En la Ĉefbiblioteka Studrondo de Turku ni kune esploris la literaturaĵon *Evelino* de James Joyce en la traduko de Russ Williams. Iujn esprimojn ni devis vere cerbumi kaj pripensi.

Jorma Ahomäki (Finnlando)



Mi nepre volis aŭdi ĉiujn 10 podkastojn antaŭ ol skribi al vi. Ĝus mi finaŭdis la jubilean dekan podkaston, kaj mi povas nur diri: “Bonege! Bonege! Daŭrigu tiel, mi petas”. Ĉiuj eroj de la podkasto estas interesaj. Speciale por miaj grupanoj, kiujn mi ĉiam denove instigas aŭskulti viajn podkastojn, tre taŭgas la laŭtlegado de tekstoj el “*La Ondo de Esperanto*”. (Mi estas la prezidanto de la Esperanto-grupo Villingen-Schwenningen, Germanujo en la Nigra Arbaro.) La legado estas flua kaj bona. La voĉo de sinjorino Halina Gorecka estas tre klara. Treege plaĉis ankaŭ la klara kaj gaja voĉo de la kantistino Natalia Striĵnjova. Ni ĉiuj deziras denove aŭdi ŝin! Komprenoble ni devas ankaŭ laŭde mencii vian sonorant, trankviligan voĉon.

Josef Schiffer (Germanio)

Nun eblas konstati, ke nuntempa Esperanta skribmaniero estas “nacia” aŭ kvazaŭnacia, sed ne internacia. Sed la lingvo mem pretendas esti internacia kaj por efektive realigi ĉi tion necesas iom ŝanĝi Esperantan skribmanieron (tute malmulte!). Mi longe laboris por trovi simplan internacian varianton de skribo por ĉiuj lingvoj, inkluzive Esperanton, kaj mi sukcese kreis ĝin en aŭgusto 2000. Mi povas rakonti al la legantoj de *LOdE* pri mia projekto de latinlitera stilo de skribo.

Leonid Daŝevskij (Ruslando)

Estus bonveninde grava afero, se oni en *LOdE* regule povus mencii jenan fakton: Esperanto — rekonita kiel *literatura lingvo* de la Internacia PEN Club! Tio estas multe pli grava por la prestiĝo de Esperanto, ol ekzemple personoj, kiuj naive svingas verdstelajn flagojn. Verŝajne nia mondlingvo estus havinta hodiaŭ pli grandan respekton, prestiĝon, renomon, se nia lingvo estus havinta ekzemple, centojn da Kalocsay-oj, Auld-oj, Boulton-oj. Lerni, apliki Esperanton estas ja pro totala manko de esceptreguloj, idiomoj, vere tempogajna, tamen, bedaŭrinde, troviĝas inter la esperanto-parolantoj ankoraŭ tro multe da “balbutantoj”.

Bertil Englund (Germanio)



Bjalistokano Andrzej Remza la 1an de junio surmetis frakon, ĉapelon kaj okulvitrojn, alpinglis la Ordenon de Honora Legio, kaj, kiel Ludoviko Zamenhof, forvojaĝis en la samnova trajno. (Fotis Mateusz Holownia)



En la unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilno estis elektita nova estraro de TEĴA (de maldekstre): Mariana Evlogieva, Dieter Rooke, Aleksander Korĵenkov, Audrys Antanaitis, Kalle Kniivilä, Vytautas Ŝilas. (Fotis Gintautas Stalnionis)



15–17 maj sur la ĉefplaco de Krakovo okazis Scienc-Festivalo. La stando de la Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Jagelona Universitato, ĝuis grandan popularecon. Deĵorantoj ĉe la stando gvidis mallongajn lecionojn de Esperanto kaj disdonis flugfoliojn pri Esperanto al studentoj kaj lernejanoj. (Magdalena Tatara / Andrzej Sochacki)




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO

Tolkien J.R.R. *La Kunularo de l' Ringo*.
La unua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
464 paĝoj, 30 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ

Tolkien J.R.R. *La du turegoj*.
La dua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
368 paĝoj, 27 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REĜO

Tolkien J.R.R. *La reveno de la Reĝo*.
La tria volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
328 paĝoj, 24 eŭroj.



Georges Simenon. *La flava hundo*.
La kvara Esperanto-libro pri komisaro Maigret.
120 paĝoj, 12 eŭroj.